



NORDHUNGARIA INFORMO

*Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc*

Oktoebro – Novembro - Decembro 2011-a

6a jarkolekto nro 74-76

Enhavo

Pluvo.....	3
Malnovaj hungaraj monatonomoj	4
Naturo sanigas, la kuracisto kuracas	4
Datrevenoj	4
Operludado en Miskolc dum la dua duono de la 20. jarcento.....	6
Humuraj saĝecoj.....	13
2011 estas Internacia Jaro de la Livona Lingvo	14
Flago kanto de Livonoj	15
En la Miskolca Biblioteko „Ferenc Rákóczi II-a”	18
En La Monda Tago De Filozofio	19
Kiel verki por la gazetaro?	20
El La Animo	20
Gravaj informoj kurte.....	25
Citaĵoj de Jan Werich	26
Antaŭ 120 jaroj naskiĝis d-ro Kolomano Kalocsay	26
Lulkanto: Dormu milde	31
Antaŭ 120 jaroj naskiĝis Julio Baghy	33
Krozanta Babelturo	35
35a Hungaria Esperanto-Kongreso	37
Fiŝhokistoj inter si	39
Fine de la jaro 2011	40
Ĉiam havu tempon... ..	40

D-ro L.L. Zamenhof

Pluvo

Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas

Senĉesas, senfine, senhalte,

El ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'

Are gutoj frapiĝas resalte.

Tra la somoj de l' pluvo al mia orelo

Murmurado penetras mistera,

Mi revante aŭskultas, mi volus kompreni,

Kion diras la voĉo aera.

Kvazaŭ la sopir' en la voĉo kaŝiĝas

Kaj aŭdiĝas en ĝi rememoro...

Kaj per sento plej stranga, malĝoja kaj ĝoja,

En mi batas konfuzo la koro.

Ĉu la nuboj pasantaj, jam ofte viditaj,

Rememore, en mi reviviĝis,

Aŭ mi revas pri l' sun', kiu baldaŭ aperos

Kvankam ĝi en la nuboj kaŝiĝis.

Mi ne volas esplori la senton misteran,

Mi nur revas, mi ĝuas, mi spiras;

Ion freŝan mi sentas, la freŝo min logas,

Al la freŝo la koro min tiras.

Malnovaj hungaraj monatonomoj

Laŭ la malnovaj nomoj, Oktobro: estas monato de la Semado, Novembro: estas tio de la Pereo, Decembro estas tio de la Sonĝo.



Decembro - Pentraĵo de d-ro Ferenc Földi (1888-1952)

Naturo sanigas, la kuracisto kuracas

Jam de pratempoj la homo scias, ke la varma akvo estas unu el inter la kuraciloj por la homaj ostoj suferantaj pro la veterŝanĝiĝoj aŭ de la maljuneco. Hungarujo abundas en termakvoj, tial multloke konstruiĝis banejoj kaj elstartis la kuracturismo. Al la fame bonaeraj banlokoj de regiono Norda Hungarujo apartenas: Bogács, Egerszalók (bogaĉ, egersalok) kaj la Termal- kaj Grotbanejo de Miskolc-Tapolca. La kurac- kaj termalakvaj banejoj vizitataj estas ĉiusezone, ili akiris rekonon tutmonde pro siaj kuraca-duonsekigita ŝlimo, mikroklimato de banejoj kaj la kuracista scio.

S-ino Adri Pásztor

Datrevenoj

Antaŭ 780 jaroj mortis Sankta Erzsébet (Erĵebet=Elizabeta) (en Germanujo kie ŝi vivis 20 jarojn, estis nomita Sankta Elizabeto de Turingio). Ŝi naskiĝis en Sárospatak, la 7an de julio en 1207, kaj mortis la 17an de novembro en 1231, Marburg. Ŝi estis filino de la hungara reĝo András IIa (Andreo) kaj Gertrud de Meranio. La nomo Erzsébet estas hebreoorigina, sed devenis el la gernana virinnomo Elizabet. La nomsignifo estas: Dio estas mia ĵuro. Ŝian nomfeston oni metis en la romian kalendaron en 1670 al la 19an de novembro, pro ŝia entombiga tago. Tamen post la kalendar-reformo ĝi estis transmitita en Germanio al la 17a de novembro, sed en Hungarujo la nomtago restis la 19a de novembro. Pri ŝia vivo vi povas legi pli abunde en la Vikipedio: http://eo.wikipedia.org/wiki/Elizabeto_de_Hungario aŭ en la hejmpaĝo hungarlingve: <http://www.szenterzsebet.hu/index.php?page=elete>



Franz Eybl (1806-1880)

Altarbildo pri Sankta Erĵebet, el kapelo de kastelo de Sárospatak

/Sendita de la Katolika Eklezikolektaĵo de urbo Sárospatak /spatak@enternet.hu/

*

Antaŭ 160 jaroj mortis Béni Egressy instruisto, komponisto (Sajókazinc 1814, †Pest 1851) siajn lernejojn li finis en Miskolc ĝis 1831, poste en la Kalvinana Kolegio en Sárospatak. Li estiĝis instruisto, poste ekzemplon de sia frato sekvante ankaŭ li iĝis teatra aktoro. Ekde 1834 li aktoradis en la teatra trupo en Koložsvár (koloĵvar). De 1843 li rolis kiel membro de la Nacia Teatro en Pest. En 1843, pere de muzikigo de *Proklamo* de Mikelo Vörösmarty, li gajnis la konkurspremion de la Nacia Teatro.

*

Antaŭ 300 jaroj finiĝis la liberecbatalo de hungaroj (1704-1711) estrita de nia majesta regnestro princo Ferenc Rákóczi IIa (Borsi, 27. marto en 1676. † Rodostó, 08. aprilo en 1735).

*

Antaŭ 105 jarojn (oktobro 1906) la el Turkio hejmenportitajn cindrojn de Ferenc Rákóczi IIa regnestro princo de hungaroj, kaj de sia patrino Ilona Zrínyi, inter landaj solenaĵoj estis enkriptigitaj al eterna ripozo en la Sankta Elizabeta ĉefkatedralon de Kaŝša (ĝi apartenas nun al Slovakio).





Geesperantistoj ĉe memoraĵoj pri Ferenc Rákóczi II^a - Rodoŝto Memordomo en Koŝice, 2011.



Jen kripto Rákóczi en la ĉefkatedralo de Kaŝŝa

*

40 jaras la Sporthalo en Miskolc, ĝia nomo estas de 2010: Generali Arena.

40 jaras ankaŭ la ĉampiona teamo de glaciĥokistoj „Blankaj Ursoj” de Miskolc.

Karlo Sziklavári

Operludado en Miskolc dum la dua duono de la 20. jarcento

La suba studo estas mallongigita kaj reviziita varianto de mia skribaĵo, aperinta en la volumo, „Operludado en Miskolc, 1954-2004” , eldonaĵo de la Departementa Biblioteko Ferenc Rákóczi IIa en Miskolc, en 2006. Tiu skribaĵo donas historian trarigardon pri loka opervivo de duoncent jaroj, sed detalan konigon ĝi donas nur ĝis la politikaj ŝanĝoj de la jaro 1989, surbaze de la ĝis nun trovitaj dokumentoj /teatraj, bibliotekaj, arkivejaj materialoj./

Kaj nun sekvu kelkaj datumoj por informado!

Novembro 1953: estigo de opersekcio en la Nacia Teatro de Miskolc, kiu aranĝis prezentadojn;

novembro 1957: ĉesigo de la opersekcio sekve de politika decido;

de 1958 : okazis ĉefe operaj gastoludoj en Miskolc; kelke da lokaj operprezentaĵoj ekster la granda teatro;

decembro 1989: rekomencigo de la memstara operludado en la Nacia Teatro de Miskolc; aŭtune de 1998 estigo de operfako.

junio 2001: I. Internacia operfestivalo, sub la titolo „Bartók + Verdi” en Miskolc.

I.

Unu esperplena disvolviĝo kaj ĝia fino /1953-1957/

La jaro 1949. estis turnopunkto en la historio de la hungara teatro: niaj teatroj falis sub partioŝtatan direktadon ekde aŭgusto de 1949. Oni direktadis la teatrojn centralizite kaj burokrate. La Popolklerigada Ministerio per akraj okuloj kontrolis la plenumon de la instrukcioj. La Ministerio modeligis la agadon de la teatroj laŭ intereso de la reĝimo, tiel ke la programo estis ne simple „malnovmaniere” cenzurita, sed iĝis preskribita; teatraĵon deflankiĝantan de la planita repertuaro oni devis aprobigi. /Kaj la grandaj diferencoj kaŭzis kolereton: vidu ekz. la arkivejan dokumentaron de la 1954/55.-jara sezonplano: B.A.Z.-departementa arkivejo VIII. 701/C., miksaj dokumentoj 1953-1961./

Krom la politika influo al la teatroj /multfoje oni enmiksigis ankaŭ en la privatan vivon de la aktoroj: en Pécs ekz. la polico kelkfoje molestis ilin dum la unua duono de la 1950-aj jaroj, pro – onidirite - konduto malinda al la moralo de la diktaturo. Vidu la gazeton „Művelt nép (Klera popolo), nr. 14.X.1956.: Intervjuo kun Ferenc Katona, direktoro de la teatro;/ la Ministerio decidis ankaŭ en iliaj financaj aferoj, ofte ne konsiderante la racion. Ekz. ĉe la teatro de Miskolc unue ĝi pligrandigis la etaton de la geaktoroj (novembro de 1953), ekirigante la lokan operludadon – sed post kelkaj monatoj ĝi forprenis la samajn postenojn (aŭgusto de 1954) kaj devigis la aktoraron kroĉiĝantan al la freŝaj tradicioj „por funkcii neleĝe” ĉirkaŭ dum du jaroj. /Vidu „Művelt nép 20. V.1956., artikolon de Petro Mura kaj Frederiko Róna, titolita „Zorgoj de unu neleĝa opero” /

Trarigardo de la repertuaro de la sezono 1949/50. vidigas ke ĝi estis kompatinda, kompare al la antaŭaj du sezonoj. /Kiel aldonaĵon mi komunikas la fakton – kiu citas groteskan mondon de filmarto kaj literarturo -, ke aŭtune de 1949 oni nomumis avanlaboriston de ferfabriko kiel teknika direktoro de la teatro, apud kiu la konkretan gvidadon plenumis la arta direktoro kaj la administra sekretario. /Cetere la teatro funkciis sub la nomo Ŝtata Déryné-Teatro de oktobro de 1952., / la nomŝanĝon anoncis Stefano Bozóky, direktoro, la 29-an de septembro de 1952 dum la festo s-ino Déry/ ĝis aŭtuno de 1956, poste, dum la revolucio ĝi denove iĝis oficiale Nacia Teatro de Miskolc (kaj por ke la urbo ne estu malfidela al memoro de s-ino Déry pro la ne tro feliĉaj alinomigoj, la konstruaĵo en la apudteatra strato ricevis la komplikan nomon ”Déryné-teatro, ĉambroteatro de Nacia Teatro de Miskolc”./ Gazeto Nordhungario 7. dec.1956. Eĉ pli ridinda ol tiuj nomŝanĝoj estis la alinomigo de la kultura gazeto de la urbo: dum 1953/54. ĝi funkciis sub titolo „Fornego”, en 1955 sub titolo „Széphalom” kaj ĉi tiel aperis ĝis fino de 1956 kune kun la gazeto „Elvidejo.”/

Ĝis la revolucio la institucio jam transvivis la elprovadojn de la centra direktado: / kion tio signifis krom la jam menciitaj, tion montras la arkivejaj dokumentoj de la sezono 1954/1955.:/ transirante de junio de 1956 sub la aŭtoritaton de la urba konsilantaro, la teatro havis iomete

pli hom-centran kontrolon. Liberiĝante de multe da ideologiaj ŝarĝoj, la institucio povis labori pli facile, ol antaŭe. Kaj la aktoraro estis pli fida kaj aŭtune de 1956 okazis pligrandiĝo de la etato de la aktoraro. Dank' al la pligrandiĝo de la etato estis planite por prezenti ses operojn, tri baletojn kaj krome teatraĵojn de diversaj klasikuloj de la enlanda kaj monda literaturoj (Shakespeare, Mérimée, Ibsen, Madách, Sartre), kaj refreŝigi du aliajn operojn. Kiel novaĵojn oni planis meti en la repertuaron dudek teatraĵojn. La menciitaj datumoj povas diri eĉ pli multe, se ni konsideras, ke dum la pli fruaj tri sezonoj sume kvin operprezentadojn havis la aktoraro, kadre de po 12-15 premieroj sezone.

Sed la malnova belega konstruaĵo de la teatro fine de jaro 1956 montris plorindan, kompatindan vidaĵon. Ĉirkaŭ ĝi estis multe da ruboj kaj ĝi estis ĝisduone malkonstruita. La lasta prezentado de la teatro okazis la 8-an de julio, kiam oni prezentis la opereton de Ferenc Farkas „Kantas la arbaro”. Post oktobro komenciĝis la modernigantaj alikonstruaj laboroj. Ĉi tio okazis en tute ne taŭga tempo, ĉar la historio ripetis sin mem. Nome post la malvenkaj revolucioj la laŭleĝeca nenihaveco malhelpis la antaŭplanitan rapidan efektivigon de la konstruadoj. (Aŭtune de la jaro 1849 nome vane pretitiĝis la eksteraj muroj de la teatro, la internaj partoj longtempe ne estis finfaritaj. Pro tio ĉi la teatron oni malfermis nur la 3-an de septembro de 1857.)

Racie oni planis la transdonon de la modernigita konstruaĵo en 1956 okaze de la proksimiĝanta jubileo /pri la alikonstruo jam pritemis dum la unua duono de 1954 kaj oni volis transdoni la konstruaĵon en septembro de 1955. (pri tiu ĉi ni ankoraŭ revenos.) Pri la plano de la jubilea transdono la gazeto „Nordhungario” skribis la 25-an de aŭgusto 1956. La revuo „Bulteno de Borsod” 1959/6 okupiĝas pri la aliformado de la teatro;/ sed la altestimata publiko de Miskolc devis atendi la jubilean okazon ĝis la 10. de decembro 1959. Ĉu iu ajn konjektintus, ke la tro longan rekonstruadon ne tri sezonoj kaj duono, sed tri jardeka teatra agado postsuferos? Tio malfavore influis la kulturon de la urbo. Aludante la mankon de la mono kaj la malfeliĉajn cirkonstancojn, la estroj de la departemento kaj de la urbo fine de 1957 ĉesigis la operensemblon estigitan antaŭ kvar jaroj, kaj kiu bele evoluis spite al siaj infanmalsanoj.

Estas fakto, ke dekomence mankis la kondiĉoj de la altnivela opervivo en Miskolc dum la 1950-aj jaroj. Se ni volas konsideri la kvar jarojn de la aktoraro, ĝi havis ĉiam multe da bataloj, elementaj zorgoj, kiujn pligrandigis la provincaj cirkonstancoj. Sur la agadon de la aktoraro sterniĝis konstante la ombro de la dependado de neantaŭkalkulebla potenco. Aŭtune de 1956 la situacio iĝis neeltenebla: oni devis aranĝi la sezonajn prezentadojn duloke, en Diósgyőr, en la Kulturdomo de Ferfabriko, kaj en la Ĉambro-Teatro. Ĉi tio proksimigis la operludadan praktikon en Miskolc al la absurda teatro. Kion la aktoraro kapablis plenumi dum jaroj eĉ inter tiaj cirkonstancoj estas konsiderinda aspekto de kulturhistorio de la urbo.

La estigo de la opersekcio de Miskolc ne estis tamen altrudita afero. Nome tiu sekcio ne malhavis precedencojn. La postulojn pri la artospeco spegulas la pli fruaj lokaj eksperimentoj. /Kiel la prezentado de „La amortrinkaĵo” de Donizetti printempe de 1950, pri kiu ni parolos pli detale./ Konsiderendas ankaŭ la fakto, ke jam de la 1930-aj jaroj daŭra operludado okazis en Miskolc – kvankam temis ĉefe nur pri gastoludoj kaj ankaŭ la konsisto de la publiko

ŝanĝiĝis dum la tempo, precipe post la ŝtatigo. La operhistorio de Miskolc havis jam du – kvankam mallongvivajn – florepokojn. Komence de la 1920-aj jaroj Géza Sebestyén alvenis al Miskolc kun sia aktorado de Temesvár (nuna Timisoara en Rumanio), kies prezentadoj faris ankaŭ tutlande grava la operkulturon de Miskolc. La alia fama periodo estis la heroa epoko de la teatroarto de Miskolc, la legenda epoko stampita per la nomo de s-ino Déry, kiu komenciĝis en 1815, per la akcepto de la trupo de Peŝto, kaj kontinuus en 1823, per la inaŭguro de la teatro.

II.

Miskolcaj sezonoj: 1949/1950 - 1952/1953

Antaŭ la estigo de la opersekcio, dum la 1950-aj jaroj okazis nur unu operprezentado en la Nacia Teatro de Miskolc: de Donizetti: La amortrinkaĵo, la 12-an de aprilo 1950. La teatraĵo havis kvar lokajn prezentadojn, kun la kunlaboro de gasto-dirigento kaj de du invititaj kantistoj. /La orkestron direktis Petro Tóth, la gekantistoj estis Julia Papp - soprano kaj Stefano Csongor - baritono. /Sed ĉefe rolis propraj geaktoroj. Laŭ malnova tradicio reĝisoris iu solkantisto (Paŭlo Megyesi – tenoro); la teatran orkestron oni kompletigis per amatoroj kaj jazmuzikistoj. La menciitan teatraĵon oni prezentis en junio antaŭ la publiko de Eger. Tiutempe ĝi estis sola eksperimento /sed tio ne signifas, ke en la 1950-aj jaroj ne estintus similaj planoj, ja dum la 1950/51. sezono oni prezentis la teatraĵon „Johano Hány” de Zoltán Kodály, poste dum la 1951/52. sezono la teatraĵon „Karnavala geedziĝfestoj” de Ede Poldini. (la gazeto Nordhungario, 5. aŭg.1950, kaj 26. aŭg. 1951.). Por la 1950/51. sezono – laŭŝajne – ne estis konkretaj operplanoj/ kaj jam tiutempe evidentiĝis la neceseco de unu konstanta opersekcio, kun sufiĉa nombro de geaktoroj. / „Nordhungario”, 14. apr.1950. kaj la revuo „Teatro kaj Filmarto 23. apr. 1950./

Plurspecaj operaj gastprezentadoj okazis en Miskolc dum la unua triono de la jardeko. En la repertuaro estis la teatraĵo „Cavalleria Rusticana” de Mascagni, prezentita (ligita kun koncerto) de la Kulturgrupo de la Fer- kaj Metaluzino de Csepel. La loko de la prezentado estis la Kulturdomo de la Ferfabriko, la 20-an de majo 1950. Tiun prezentadon oni ripetis sekvatage antaŭtagmeze en la teatro. Por evidenti la gravan kulturpolitikan signifon de la okazintaĵo, ambaŭfoje oni disaŭdigis la programon per megafonoj en la tuta urbo. /„Nordhungario”23. maj.1950./ Dumsomere la Subĉiela Scenejo de la Popolĝardeno gastigis diversajn muzikajn spektaklojn. Tie oni prezentis la 30-an de aŭgusto 1951 la teatraĵon „La barbiro de Sevilo” de Rossini. La orkestron direktis Zoltan Rozsnyai kaj gekantistoj de Operdomo de Budapeŝto kaj la Simfonia Orkestro de Miskolc kunlaboris.

Komence de la 1950-aj jaroj la publiko de Diósgyőr kaj Miskolc povis vidi muzikan teatraĵon plej ofte dank’ al la Vojaĝanta Opergrupo de Budapeŝto. La persezone funkciantan institucion oni estigis en 1948, kaj ekde la aŭtuno de 1949. oni funkciigis ĝin per pligrandigita kapacito por decentre certigi la operludadon en la provinco. Ĉi tiu alcentriga intenco havis ideologian kialon: la Vojaĝanta Opergrupo de Budapeŝto devis konkretigi taskon de la kultura revolucio, nome ĝi devis porti la tradiciajn formojn de la artoj pli proksimen al la (daŭre) severa sorta tavolo de la laboristoj. /La disdividon de la enirbiletoj organizis la lokaj konsilantaroj kiuj kutime favoris la fizikajn laboristojn. Ĉi tiu saĝa praktiko kaŭzis, ke okaze

la gelernantoj de la muzikartaj lernejoj ne povis viziti la prezentadon (Nova muzika revuo 1952/7/. Ekde la sezono 1949/50 la trupo aranĝis po cent prezentadoj jare – ĉefe en la provinco kaj precipe en industriaj centroj, aŭ en grandaj urboj, kiel Ózd, Miskolc, Salgótarján, Kaposvár, Pécs, Győr kaj Sopron.

Ĝis oktobro de 1953 tridek prezentadoj okazis en Miskolc kaj Diósgyőr (24 kaj 6). /Amadé Németh, la tiama gvidanto de la opergrupo komunikis resumon pri ĉiuj teatraĵoj de la Vojaĝanta Opergrupo ĝis la 21-a de oktobro 1953 en la revuo „Nova Muzika Bulteno” (dec.1953.) La nombro de la prezentadoj en la menciitaj urboj estas: Ózd:29, Salgótarján:22, Kaposvár:23, Pécs:37, Győr:33, Sopron:25./

Krom la orkestro, la tuta personaro apartenis al la Operdomo – kune kun la rekvizitoj -; la son-amplifikadon (per sia simfonia orkestro) kaj la transportadon de la personaro kaj rekvizitoj entreprenis la Hungara Ŝtata Fervojo. La opergrupo veturis en kvin fervojvagonoj, alligitaj al laŭhoraraj trajnoj. Pro tio ilia laboro tute ne estis facila, ĉar fine de la longaj veturadoj alvenante al la celstacio multfoje ili devis komenci la ludon lace. Ili havis problemojn ankaŭ pri la tranoktado. Eble tipa estis tiusence la prezentado de „Banuso Bánk” de Ferenc Erkel en Diósgyőr en la kulturdomo de la Ferfabriko la 23-an de majo en 1951, kiun ili devis fari preskaŭ sen antaŭprepariĝo. Ili ekiris el Salgótarján, kie dum du vesperoj ludis ĉi tiun teatraĵon, malfrue atingis al Füzesabony, Mezökövesd kaj Mezőkeresztes, poste alveninte al Miskolc ili devis multe atendadi la malŝarĝon de la rekvizitoj. Finfine evidentiĝis, ke neniu prizorgis pri la hotela tranoktado. / Nordhungario, 25. majo 1951./

La Vojaĝanta Opergrupo ludis tutlande la ĉefverkon de Ferenc Erkel ekde januaro 1951, kun la dekoracioj de Gustavo Oláh, kiu estis ankaŭ kunreĝisoro. Ilia repertuaro konsistigis ĉefe tiuj teatraĵoj, kiuj ne bezonis grandiozan aparataron kaj estis ĝenerale kompreneblaj. Ĉi tiuj estis precipe: Banuso Bánk, Traviata, Rigoletto, La barbiro de Seviljo, Don Pasquale (paskvale), La Bohemio, Tosca (toska), Madama Butterfly (Papili-fraŭlino), La forfuĝigo el la serajlo, La Vesperto. Ĉiujn menciitajn teatraĵojn oni prezentis ankaŭ en Miskolc kaj en Diósgyőr inter 1949 kaj 1953.

Post la mallonga landa monopolo de la Operdomo sekvis la racia malcentrigo kaj estiĝis provincaj opergrupoj (laŭ kronologio: Szeged, Debrecen kaj Miskolc.) Ankaŭ tiuj ricevis kiel plusan taskon sisteme prezenti operludojn ankaŭ en aliaj setlejoj, malpliigante la ŝarĝon de la Vojaĝanta Opergrupo de Budapeŝto. Pro budĝetaj kaŭzoj ili tamen ne povis plenumi tute la taskojn /tiel la opergrupo de Miskolc povis aranĝi sume tri regionajn prezentadojn ĝis somero de 1956. (vidu raporton kaj evoluigan planon de Petro Mura en Nova Muzika Bulteno-1956/7-8). Ankaŭ la opergrupo de Szeged plendis pro tio somere de 1956. (vidu skribaĵon de Vilhelmo Rubányi en la menciita revuo./ Sed la vojaĝanta opergrupo de Debrecen - fondia antaŭ kelkaj monatoj - ĝuste tiel alvenis al Miskolc. Tiu opergrupo prezentis en la „Déryné”-teatro la 12-an de januaro 1953 la teatraĵon „La barbiro de Seviljo de Rossini. Ilia prezentado plibeligis la kulturan vivon de Miskolc. /Kritiko aperis en la gazeto Nordhungario – 15. januaro 1953./

(En Nordhungaria informo: fino de la 1. parto.)

III.

La Sezono 1953 / 54.

La centra Vojaĝanta Opergrupo funkciis ĝis aŭtuno de 1954. / Ĝian agadon ĉesigis la sama dispono, kiu forprenis la budĝetan subtenon kaj preskaŭ interrompis ankaŭ la daŭradon de la operludado en Miskolc (pri ĉiuj ĉi pritemos pli malfrue/, sed sufiĉas rigardi la repertuaron de la opergrupo de Miskolc, kiu funkciis de la fino de 1953 ĝis la fino de 1957/ ĝia estigo diskutigis jam somere de 1952 (vidu la duan volumon de „Dokumentoj al la historio de la hungara muzikvivo 1945-1956”, eldonis Melinda Berlász kaj Tibor Tallian, Hungara Scienca Akademio, Bp. 1986. 57. dokumento.) En junio de 1953 la decido aperis; oni organizis la opergrupon en novembro kaj fine de decembro ĝi komencis funkcii efektive/, kaj ankaŭ tiun de la Vojaĝanta Opergrupo de Debrecen, por vidi ke tio kion la vojaĝanta Budapeŝta grupo ofertis al la provinco ne restis sen daŭrigantoj. Cetere la muzikistojn de la „Déryné-teatro” direktis Petro Mura, kiu akiris signifajn spertojn en la laboro de la Vojaĝanta Opergrupo de Budapeŝto kiel ĝia estro inter 1950-1953, kaj kiu direktis ankaŭ plurajn miŝkolcajn prezentadojn de la opergrupo. Ĉi tiujn spertojn li povis utiligi ekde la komenco, sed ĉefe en 1954-1956 inter malfacilaj cirkonstancoj (en la sezono 1954/1955. li estis ankaŭ komisiita teatra direktoro).

En Miskolc ne estis bona la situacio ankaŭ komence de 1954. La malfacilaĵoj similis al la oftaj malfacilaĵoj de la Vojaĝanta Opero: estis problemoj pri la loko, pro la etato de la geaktoroj, kiu limigis nombron de la prezentablaj teatraĵoj. La unua prezentado de la nova aktoraro estis: La Trobadoro de Verdi, la 26-an de februaro 1954. Tiu prezentado tuj donis grandan taskon al la organizantoj. /Ĝin reĝisoris Georgo Orosz, dekoraciisto estis Endre Ŭtő, kostumdesegnisto: Tivadar Márk, ĥordirektoro: Zoltan Szotyori, direktis: Petro Mura, kritiko: gazeto Nordhungario 7. marto 1954./ Instruitajn orkestrajn muzikistojn apenaŭ oni povis dungi pro la lokaj malbonaj loĝeblecoj. Sed malgraŭ tio la orkestro de la teatro havis cent muzikistojn en la dua duono de la sezono 1953/1954. Pro la problemoj pri la provoĉambrego okazis disputoj, kvereloj inter la prozaj kaj muzikaj sekcioj. Sed la plej malfacila problemo estis, ke la orkestrejo estis tro malgranda por enteni la tutan orkestron. La blovorkestro kaj tamburistorkestroj devis okupi du teretaĝajn flankloĝiojn dum la prezentadoj (tio tranĉis orelojn de la spektantoj, ĉar la du orkestroj klopodis konkuri unu kun alia kaj ĉiam pli kaj pli laŭte muzikis.) Estis bezonata la modernigo de la teatro (la orkestrejon oni devis pligrandigi, oni devis aliformigi la spektantarejon kaj la scenejon kaj oni devis konstrui ankaŭ novan konstruaĵon.) Ĉi tiujn laborojn oni planis jam printempe de 1954 kaj ili devis finiĝi ĝis septembro de 1955. / Petro Mura: Niaj problemoj - en gazeto „Kohó” junio de 1954./ -, sed oni ne komencis la laborojn, ĉar en aŭgusto de 1954 oni malpligrandigis la budĝeton de la institucio.

Ekde marto de 1954, la duono de la prezentadoj estis muzikaĵoj (opero, opereto, kantoludo.) Dum dekok vesperoj rolis la geaktoroj „La Trobadoro”-n de Verdi ĝis majo de 1954 laŭ duobla distribuo de la roloj. /inkluzive la gastaktorinojn Maria Dósa de Debrecen kaj Julia Papp de Szeged./ Kelkfoje ĝi estis prezentita ankaŭ aŭtune de 1954 kaj en aprilo de 1956 ĝi

estis renovigita. Fine „La Trobadoro” estis prezentita 25 fojojn. Ĉi tiu estis la plej sukcesa spektaklo de operensemblo de Miskolc.

La reputacion de la teatraĵo pligrandigis, ke la trupo-premiero okazis ĝuste cent jarojn post la Hungarlanda premiero (31. okt. 1854). Ankaŭ la loka urba tradicio pledis por la enrepertuarigo de la populara opero de Verdi: ĝi estis prezentita komence de la sezono 1923/24., okaze de la grava jubileo de la loka teatro (la 4-an de oktobro, okaze de 100. datreveno de inaŭguro de la unua ŝtonteatro.)

El inter la kantistoj de la 1954. jara La Trobadoro - premiero Julio Littay (grafo Luna) kaj Emerigo Pálos (Manrico) estis dum longaj jaroj karakterizaj personecoj de la operesperoj de Miskolc. (Littay restis ĝis la ĉesigo de la trupo.) Maria Király bele kaj elstare rolis rolon de Azucena. La privatkantistoj, karieron komencantaj gejunuloj, ankoraŭ ne havis scenejan sperton, kaj tio ne estis avantaĝa por ili. Ilia faka pluperfektigo ne estis certigita: en Miskolc ne estis ebleco por daŭrigi la aktorajn studojn, ili ne havis kantomajstron (en la provincaj teatroj ĉi tiu estis la tiama negativa eco./ Tutlanda estis ankaŭ la manko de koreografo/). Apartan problemon konsistigis tiuj neinstruitaj privatkantistoj, kiuj agadis ĉe la teatro jam antaŭ la organizo de la opergrupo (en operetoj kaj diversaj muzikaj teatraĵoj.) Sed la plej granda problemoj estis la konsisto de la ĥoro: komence de la operludado oni devis utiligi ĉiujn malnovaj membrojn (spite al ilia sentaŭgeco.) Ankaŭ en Debrecen kaj Szeged estis similaj problemoj, kio estas unu el la absurdaj duoblecoj de ĉi tiu epoko: dum la tempo de prosperiĝo de la ĥorokulturo la operludadon malhelpis la persona konsisto de la ĥorusoj de la regionaj teatroj!

La kritikistoj, taksante la duan operprezentadon de la opergrupo, raportis pri esperiga evoluo de la ĥoro kaj pri la pli homogena sono de la orkestro, spite al la lokigaj malfacilaĵoj.

La datreveno de naskiĝo kaj morto de Smetana (1824-1884) donis la ideon por prezenti la popularan gajan operon, la „Vendita fianĉino”. / Inter la premieroj de „La Trobadoro” kaj „Vendita fianĉino” la aktoraro prezentis operon (Andreo Szöllősy: Birdo de bela edzino) kaj opereton , (Ĉardaŝa reĝino). La teatraĵon „Vendita fianĉino” reĝisoris Georgo Orosz, la dekoraciisto estis Endre Ŭtő, koreografo estis Viola Rimóczy, direktanto de ĥoro estis Zoltán Szotyori. Direktis la orkestron Petro Mura. Kritiko: gazeto Nordhungario-23, julio 1954. La teatraĵojn „La Trobadoro” kaj „Vendita fianĉino” oni planis prezenti antaŭ la fondigo de la opergrupo, komence de la sezono 1953/54.. (Nordhungario, 11, okt.1953.)/ Nekutime la premiero okazis fine de la sezono (16. julio 1954). Sed printempe de 1955 ankaŭ pluraj prezentadoj okazis inter aliaj en aprilo, okaze de la Muzikaj Tagoj de Miskolc.

Petro Mura klopodis solvi la menciitajn problemojn pri la kantistoj dumaniere: unuparte pere de kontaktoj kun la provincaj opergrupoj, aliparte pere de kontaktoj inter Budapeŝto kaj la ceteraj hungaraj teatroj. Li tiel opiniis, ke la operarto de la provinco povintus esti kompletiga bazo por la ĉefurbo (ĉi tiun opinion ankaŭ aliaj kundividis. / Vidu artikolon de Petro Mura en la gazeto „Kohó” en junio de 1954; vidu skribaĵon de Nikolao Csillag en Nova Muzika Revuo 1954/7-8; pli malfrue artikolojn de Petro Mura kaj Frederiko Róna en gazeto Klera Popolo, 20, majo 1956/. Esence la ideo ne estis nova: fine de la 19. jc. ĝi aperis ankaŭ oficiale. Sed por la ministerio la opero de Miskolc estis nur ŝarĝo de plusa elspezo. (Pri la

spektakloj la ministerio apenaŭ interesiĝis.) Oni volis solvi la problemojn per ĉesigo de la opergrupo de Miskolc. Al la provincaj aktoraroj ĝi ne deziris la saman sorton, ĉar nur ĉe la aktoraro de Miskolc okazis tiel grandskala nuligo meze de 1954, sub emfazo de ŝparemaj sloganoj. Nome tiel malpliĝis la nombro de muzikistoj de 40 al 32 personoj, nombro de dancensemblo de 12 al 8 personoj, nombro de kantoĥoro de 32 al 20 personoj. Post tio la opergrupo de Miskolc dum du jaroj oficiale ne ekzistis. /Vidu artikolojn de Petro Mura kaj Frederiko Róna, en la gazeto Klera popolo, 20, majo 1956./ Kvankam oni sukcesis gardi la ĝistiamajn rezultojn kun provizoraj solvoj, la novaj kondiĉoj similis al la aktorado de la komenco de la 19. jc. La orkestro, kiu en la dua duono de la sezono 1953/1954. povis roli ankaŭ memstare, jam ne kapablis doni koncertojn dum multaj jaroj.

La 9-an de junio 1954 la ministerio sendis – antaŭ la aŭgusta budĝet-malpliigo - la centran program-proponon al la teatroj. Por Miskolc ĝi proponis prezentojn de la subaj operoj:

László Hunyadi, La pajacoj, Cavalleria Rusticana, Karnavala geedziĝfestoj, (anstataŭ la lasta: La geedziĝo de Figaro,). Laŭ arkiveja noto de dokumento / B.A.Z.- departementa arkivejo, fond. VIII.701/c (miksaj dokumentoj 1953-61/ la estraro de la teatro alimaniere pensis, pro tio ĝi modifis la proponon laŭ la originala: Papilio-fraŭlino, La barbiro de Sevilo, Lucia di Lammermoor, Rigoletto. Fine nur du teatraĵoj realiĝis. Ĉi tiujn teatraĵojn la malpligrandiĝinta opergrupo kapablis prezenti, eĉ en 1954 kaj en la sekva jaro ĉ. 40 operludojn prezentis.

- Daŭrigo sekvos -

Humuraj saĝecoj

Kiuj estas la diferencoj inter la teologio kaj la geologio?

Ĉielo kaj Tero.

*

En la vivo vi ne povas ekhavi ĉion.

Kien vi metus tiujn?

*

La homo havas tri epokojn:

junecon

plenaĝon

„bonege vi aspektas”.

*

La flugo estas la dua plej nervostreĉa okazintaĵo,

la unua; la surteriĝo.

Sinjorino Adri Pásztor

2011 estas Internacia Jaro de la Livona Lingvo

Sinjoro Péter Nyíri (Petro Njiri, de la Muzeo de Hungara Lingvo en Széphalom) skribis al mi la sekvon, je mia interesiĝo, ĉar sur la muzeokorte staranta „Arbo de lingvoj” ankaŭ la Livona lingvo estas legebla inter la nomoj de lingvoparencoj de la hungaroj. „De sinjoro István Nyirkos (Istvan Njirkoŝ: emerita profesoro de la Universitato de Debrecen, faka helpanto de nia Instituto) mi ricevis tekstojn pri la Livonoj por vi. Elektadu el inter ili, uzu ĝin al via gazeto...” Laŭ la tekstoj ricevite de la menciituloj mi konstatis, ke nialande multuloj okupiĝis pri la Livonoj. Tiel ekzemple en la eldonaĵo FINNUGOROK VILÁGA / Mondo de la Finnugroj/ redaktita de sinjoro Georgo Nanovfszky, **András (Andreo) Bereczki** verkis eseon „Je Estimo de la Dua Mondkongreso de Finnugroj, en Budapeŝto 16-21 aŭgusto en 1996”. En ĉi eldonaĵo la aŭtoro observis historion de Livonoj ĝis fino de la 90aj jaroj de la 20-a jarcento. En la eldonaĵo titolita LINGVOJ DE LA MONDO **István Fodor** okupĝis pri konigo de la lingvo Livona. En la Uralistika Fakultato: **Jenő Jávori** kunkolektis la Bibliografion de Literaturo de la Uralaj Popoloj, al kiu apartenas ankaŭ la Livona. Ni ricevis ankaŭ materialon aperigitan de la **Ĉefurba Biblioteko „Szabó Ervin.”** Ni sciiĝis, ke **János Benyovszky** (Johano Benjovski) rememoris pri la Vortaro: Salisa-Livona-Germana. El plumo de **Valt Ernštreit** mi povis legi pri la lingvo Livona, redaktita de **doktoro Georgo Nanovfszky**, titolitan: NIAJ LINGVOPARENCOJ. En la eldonaĵo; FINNUGOR KALAUZ/Finnugra Gvidilo, redaktita de Maria Csepregi, mi legis la sekvajn frazojn, el eseo de **s-ino Eszter Ruttkay-Miklán**: „La Livona estas kalkulebla kiel formortinta Balta-finna lingvo. Pli proksime la Livona lingvo parenas kun la pliaj finnaj lingvoj; tiel ekzemple kun la estona, vota, inkeri-a, kaj la finna kaj la lingvo de Karjala, sed pli malproksime kun la pluraj Finnugraj kaj Uralaj lingvoj ĝi estas parenca...” „...Pli malfrue mi eksciis, ke kelkuloj tamen apartenas al tiu – ĉi popolo, parolantaj per ĉi balta-finna lingvo... Se ni trastudas malnovan mapon de la Baltikumo (apudajn teritoriojn de la Balta Maro), ni povas trovi grandiozan teritorion nomitan Livonio, Livlando. Livonio alinome Livlando, Livania, Livtero estas nomoj de teritorioj de la nuntempaj Estonio kaj Latvio. En la historilibroj ni povas renkonti ankaŭ la fakton pri Milito en Livonio (1555-1583). Tio, estis la tielnomita Norda Milito, dum kiu Ruslando provis konkeri la Baltikumon, kiam en 1561 Livonio submetiĝis al Litvanio petante ties apogon kontraŭ Ruslando. Tiel estiĝis Livonio arkidukejo de Litvanio inter 1561 kaj 1621. Ne gardas memoron de ĉiu eta popolo tiel multe da spuroj!” ...” Dum la esploroj komenciĝantaj en la 19a jc. raportas pri du livonaj teritorioj izoliĝintaj unu de la alia. Ĝis la pasintjarcento ni havas sporadajn datumojn pri popolgrupoj vivintaj apud la rivero Dūna (Drugava), sur la teritorioj de suda parto de la nuna Estonio kaj sur la norda parto de Latvio, sed tien vojaĝintaj esploristoj jam ne ricevis famon pri ili. Gravnombrata livona komunumo tiutempe vivis jam nur en la 12 fiŝistvilaĝoj sur la okcidentbordo de duoninsulo Kurland estante ĝi sur teritorio de

la nuna Latvio. Ties lingvon, kulturon povis noti la esploristoj, tion ni konas hodiaŭ kiel kulturo Livona. Laŭ la arkeologiaj retrovaĵoj estas elmontrebla, ke de ĉi tiu teritorio multe pli granda estis la iama loĝloko de la Livonoj. Je la pasintjarcentfine vigliginta scienca intereso kaj la disvolvo de la Livona nacia sento kulminis inter la du mondmilitoj. Tamen veras, ke pro la translokigoj de la loĝantaro dum la unua Mondmilito, per duono malmultigis la nombron de la 3 milnombra livona loĝantaro, transvivinta gravajn plagojn sed al sia originala loĝloko reiranta grupo vivis viglan kulturan vivon inter kadroj de la juna Latva Respubliko. Ili fondis la Livonan Asocion kun estrado de Karlo Stalte en 1923, kaj kreis la livonajn naciajn simbolojn. Tiel la poemo: Mia Patrujo de Karlo Stalte estiĝis la Himno Livona, kies melodio samas kun la finna kaj estonia. La flago Livona estas verda-blanka-blua-kolor-stria. La verda koloro simbolas la arbarojn, la blanka la apudmaran sablopladon, la blua la koloron de la maro. Vidu poemon pri la flago.

Kaarli Stalte

Flago kanto de Livonoj

Livonfratoj, permesu, por

levi ĉi sanktan signon,

En nia sveninta sorto

Levu nian flagon.

Jen: ĉi verd' - blanka - bluflogo

Supre flirtante diras:

Livonpopol' forgesita,

Pri bela estont' songas.

Signifoj: de verdkoloro,

Arbar-ombro atendas,

De blanka; ke pro la sablo,

Bord', kampo longe ardas.

Sub blanka, la ĉiel-koloro

La maron bluan signas,

Per ondegaj marŝtormo

Nin ofte, forte timigas.

Kriegas; la tri koloroj,

Recitu, kiu vokos:

„Unuiĝu Livonfratoj

Koro koron sanigos.

Venu; tiel ni sukcesos,

Se ĉiuj estos kune.

Venu, kaj la bordan lingvon

Sonparolu ni komune.”

/Hungarigon de doktoro Frigyes Lukinich, esperantigis: s-ino Adrienne Pásztor/

Livonlingvaj eldonaĵoj aperis grandnombre nur en ĉi periodo. En la dua parto de la pasinta jc. eldonitaj gramatiko, lernejoj lernolibroj, kaj post la tradukoj de Bibliodetaloj, aperis ankaŭ Livonlingvaj gazeto, literatura antologio, kalendaro. La Livonan lingvon oni komencis instrui kiel devigan lernobjekton en la lernejoj. Ankaŭ dum la Dua Mondmilito okazis deportadoj. La politika agado de la tiamaj politikaj sistemoj direktiĝantaj al la atrofio de etnacioj, la malpermeso de la vivtenon certiganta fiŝistado, la malatento de la infrastrukturo kontribuis, ke la Livonoj formigris de siaj iamaj loĝlokoj. La Livona Kunteno revigliĝis de 1989. La iama Kulturdomo kun hungara subteno kaj finna subvencio denove ekfunkciis. La reviviĝinta Livona Asocio ĉe Centro en Riga reorganizas la gravan parton de Livonoj devenintaj de la iamaj Livonaj terenoj. Ili organizis diversajn programojn por infanoj alproprigi la iamajn livonajn recitaĵojn, diraĵojn, popolokantojn. La ĝenerala celo de la organizaĵo estas gardo de la Livona kulturo. En ties marko ili ricevis por plibonigo de la vivteneblecoj la fiŝist-rajton de la marstreko inter 5.5 kilometroj. Sed tiu teritorio estas samtempe ankaŭ naturdefendata tereno.”

Laŭ sinjoro profesoro István Nyirkos, la Livonlingvaj publikaĵoj komenciĝis nur komence de unua parto de la 20-a jarcento, sed jam de la 19-a jc. ĝi estis objekto de pedanta lingvistika esplorado (Sjörger). En la lastaj jardekoj oni faris seriozajn fortostreĉojn por gardi la livonlingvajn tekstojn, pere de intervjuoj faritaj kun la maljunaj, sed bone parolantuloj. Fariĝis vortaroj: Livona- Latva-Germana, Livona-Rusa, kreiĝis ankaŭ literaturaj fragmentkolektaĵoj, sed la aktiva pluvivo de la lingvo estas tre dubinda.

Jen la livona a-bo-co: A/a, Ā/ā, Ä/ä, Ą/ą, B/b, D/d, Ď/ď, E/e, Ē/ē, F/f, G/g, H/h, I/i, Ī/ī, J/j, K/k, L/l, Ļ/ļ, M/m, N/n, Ņ/ņ, O/o, Ō/ō, Ó/ó, Ő/ő, (Ö/ö), (Ȫ/ȫ), Ȭ/ȭ, Ő/ő, P/p, R/r, Ŗ/ŗ, S/s, Š/š, T/t, Ț/ț, U/u, Ū/ū, (Y/y), (Ț/ț), V/v, Z/z, Ž/ž.

Laŭ la Esperanto Vikipedio; je ekzameno pri la Livonaj loknomoj oni konstatis, ke la Livonan lingvon oni parolis pli frue sur pli granda teritorio, kaj tio estis samgranda kiel duono de la nuna Latvio. La Latvan lingvon multe influis, kaj la diferencoj inter la Latva kaj Litvana dankeblas parte al influo de la livona lingvo. Ankaŭ, la latva lingvo multe influis la livonan kaj diversajn diferencojn kaŭzis inter la Livona kaj la pluraj Finnaj lingvoj. La Livona lingvo disiĝis al du dialektoj: orientan kaj okcidentan. La orienta Livona estis parolata orienten de la golfo Riga, sed ĝi malaperis en la 19a jc.... „

En Budapeŝto, la Tutlanda Fremdlingva Biblioteko (OIK) havas ĉ. 12 diversajn materialojn pri la Livona literaturo, parte tradukojn de la lingvoj: Angla, Germana, Rusa, Latva, Estona lingvaj libroj, kaj aliajn tekstojn, sed la Biblioteko havas ankaŭ esperantlingvan tekston, parte de gazetartikolo. La Flagokanto de Livonoj same estas hungarlingve ties havaĵo, kiun s-ino Adri Pásztor esperantigis. Informoj pri la livonaj tekstoj de OIK estas peteblaj ĉe: info@oik.hu. Sed ni publikas sube kelkajn el ili. Jen:

/1/ **A lívek zászlódala**/Flagokanto de Livonoj: Dokumentotipo: Cikk, poemo. Aŭtorpubliko: Kaarli Stalte (1870-1947), tradukis en la hungaran: Frigyes Lukonich. Jaro de apero: 2005.

/2/ **Válogatás**/ Elektaĵo, Cím/Titolo: **Ankoraŭ pri ekzotaj lingvoj**

Dokumentotipo: Cikk/Artikolo, Szerzőségi közlés/aŭtoreca informo: NikSt, aŭtoro: Nikula, Stella. jaro de eldono: 1992/ Objektovortoj: etnoj: lingvouzo; Iĵoroj, Votoj, Livonoj. Geologia nomo- kun objekta aneksaĵo: Rusujo, Baltikumo/ Lingvo: Esperanto. Ĝia fontodokumentumo estas: Monato ISSN 0772-456X.- 13. jarkolekto. numero 11.(1992), p.19.

/3/ Titolo: **Sur Tero de la al Duono Segitaj Boatoj**

Dokumentotipo: Cikk. Aŭtoro: (verkisto) Béla Jávorszky, Objektovorto: livonoj, historio, latvoj, diktaturo, kulturalaj institutoj, asimilacio. Geografia nomo kun objekta kunmetaĵo: Latvio, Mazirbe, LT; Kolka, LT. Forma objektovorto: eseo/lingvo * Magyar/Hungara/ Jaro de eldono: 1995. Ties baz-dokumento: Hítel ISSN 0238-9908. - 8. jarkolekto. nro 6-(junio 1995.), p.64-71.

/4/Titolo: **Bordaj Retoj**

Dokument-tipo: Cikk/Poemaro, aŭtoro: Kaarli Stalte, hungarigis Frigyes (Frederiko) Lukonich. Aŭtoro: Kaarli Stalte (1870-1947). Plia nomo: Lukonich Frigyes. jaro de eldono: 2005. Objektovorto: livonlingva literaturo: poezio. Geografia nomo kun objekta kunmetaĵo: Latvio. Ties fonta dokumento estas: Székelyföld/Sikullando/ISSN 1453-3871.-9. jk.nro 3.(marto 2005.). p. 89.

/La supran kolektadon sendis al ni la eksa bibliotekistino de OIK: s-ino Anna Marosvölgyi, ankoraŭ en marto de 2011./

„Ĉar Livonio estis laŭetne miksitaj, ne unueca, la potenculoj dividis ĝin en 1919 inter Estonio kaj Latvio. Vidzeme estas la Latva nomo de eksa Livona teritorio apartenanta al Latvio, kaj ĝi estas unu regiono de Latvio. **Sekve de la politikaj ekzekutoj sekvantaj la teritoridividon,**

la Livonoj asimiliĝis al la du popoloj. En la 13. jarcento ankoraŭ 30 miloj da homoj parolis la livonan lingvon, sed fine de la 19a jarcento, nur du mil. Kaj la Latva organizaĵo vane organizis la instruon de la Livona lingvo en la 20-a jarcento, ja **de 2009 jam nek unu homo konfesas sin Livano, neniun parolas jam la Livonan lingvon en Latvio, aŭ en Estonio kontraŭ tio, ke en Tartu kadre de la Universitato funkcias ankaŭ Fakultato pri Livonoj.** En Universitato de Tartu, la 23an de novembro 2011. okazis rememora prelego pri la Livona popolo kaj kulturo.”



Liv asszonyok nemzeti viseletben

Livonaj virinoj en popolkostumo /La bildon sendis la Landa Fremdlingva Biblioteko Budapeŝto, Hungarujo /[/Székelyföld ISSN 1453-3871. - 9.évf. 3.sz. \(2005. márc.\), p. 89./](#). Pri la Livona Popolo kaj lingvo de Livonoj ĉi kunmetaĵon verkis, kompilis kaj tradukis: sinjorino Adrienne Pásztor

En la Miskolca Biblioteko „Ferenc Rákóczi II-a”

La bibliotekajn programojn ĝenerale ni ĉeestas. La 9-an de novembro 2011a, okazis libroprezento de la niaregiona verkisto (eksa pedagogo, ĵurnalisto) **Imre Hajdú**, kiu nun eldonis sian 38an hungarlingvan libron. Kaj ĉar la libro temas pri la vinkulturado sur la „Bükkalja”/Bükkmontarsuba setlejo Bogács, kaj la libroprezento okazis antaŭ Martentago, kiam oni kutimas gustumadi la novan vinon, do la libroprezento estis ligita al gustumadoj de vinoj de la setlejoj Mád, Miskolc kaj Bogács. Ilin prezentis al la interesantoj, la tielnomataj Membroj de Vinkavalirordeno.



Jen la Vin-kavalirordenanoj. .

La 11an de novembro 2011a, ni ĉeestis inaŭguron de **ekspozicio de pentraĵoj de s-ino Inka Romanek**.



Inka Romanek: Vespera krepusko

Pri la pentroartistino abunde vi povos legi en la sekvajara marta numero de nia gazeto.

s-ino Adrienne Pásztor

En La Monda Tago De Filozofio

*Laŭ iniciato de Unesko, ekde 2002, la tria ĵaŭdo de novembro estas la Monda Tago de Filozofio. Jen mesaĝo de la prezidanto de UEA okaze de la ĉi-jara Tago de Filozofio la 17-an de novembro. En la tria ĵaŭdo de novembro – la Monda Tago de Filozofio – ni havas ĉiujaran okazon mediti. Ĝuste en 2011 tute ĵuse surekraniĝis grava verko de filozofo, kiu estis amiko de Esperanto. Mi parolas pri profesoro Ramchandra Gandhi (1937-2007), kies (anglalingva) verko *Mi estas vi: meditoj pri la vero de Barato* unue aperis en 1984 kaj reeldoniĝis ĉi-oktobre. La esperantista publiko iomete konas tiun nepon de Mahatma Gandhi. En mia postparolo al la epopeo *Poemo de Utnoa* de Abel Montagut (1993) mi prezentis jene (p 212-3) la kernon de la filozofio de Ramchandra Gandhi: *Ĉiu lingva ago estas celebros pri nia forcedo de la povo materie kaŭzi la deziratajn efikojn kaj pri nia forcedita povo lingvi novajn, postkaŭzadajn dezirojn. Tiu celebros rivelas, ke la parolanto kaj la alparolato reciproke malalias. La reciproka percepto de fremdo aŭ malmemo parencas al la kaŭzata povo kaj en vera komunikado kunsvenas kun la kaŭzata povemo, lasante nur perception de du specifecoj kies komunan, meman ekziston ne disduigas ia muro de alieco. (R. Gandhi distancigas sin de la 'vulgara malduismo', kiu neas la specifecon de la disaj, sed ne apartaj, membildoj; lia logika aŭstero malpermesas al li ne la specifecon, kiam sufiĉas nei la aliecon.)* Ne pensu, ke mia konate mallucida stilo eĉ komencas redoni la esencon de la lumaj pensoj de tiu guroo mia; mi estas nur unu el la multaj malindaj adeptoj, bonvolu ne laŭ mia stilo juĝi mian forpasintan amikon.*

Aŭdinte, ke li estas amiko kaj mentoro mia, Ludoviko Zaleski-Zamenhof petis min en 2003 komuniki al la nepo de Gandhi saluton de la nepo de Zamenhof. Profesoro Gandhi kun granda ĝojo akceptis tiun saluton – li jam de jaroj sciis pri Esperanto kaj pri Zamenhof. Li konfirmis impreson, kiun mi jam havis – nome, ke li efektive rigardas Esperanton kiel lingvon kvintesence malfremdan, malduisman, kiel enkorpiĝon de lia kompreno de la komuneco de ĉiuj homoj.

Kompreneble iuj el vi, konante la faktojn de la ĵusa reapero de *Mi estas vi*, tuj kaptos, ke mi provas komuniki al vi la ekziston de mia prefaco en la aktuala eldono de la verko de profesoro Gandhi. Vi filozofe konsilos min forigi el la psiko ĉiujn restaĵojn de la miismo, kiu baras la vojon al mia kapablo vere kaj senmanke malfremdigi la universalan anaron de nia asocio, por ne paroli tro tuje kaj haste pri la tuta homaro. Sed vi miskomprenas. En tiu prefaco mi prezentis ne vortojn miajn, sed rakontojn pri mia aŭskultado al la guruaj vortoj de la filozofa Frato Ramu (kiel mi ĉiam nomis lin), kaj pri mia humila akcepto de iuj liaj tre gravaj senerarigoj. Tion mi diras al vi en la Tago de Filozofio ne por malmodesti, sed por kiel eble plej humile deklari mian pretecon lerni de ĉiu el vi. Kaj, demetante ĉi tiun mokmodestan tonon, mi permesu al mi inviti vin mediti pri la parenceco inter la pensoj de tiu malduisma filozofa kaj la interna ideo de la avo de Ludoviko Zaleski-Zamenhof. Por spici tiun inviton laŭ la humura stilo, kiun ŝategis kaj regule praktikis Frato Ramu mem, mi devas raporti al vi, ke iu kanajla amiko mia en Esperantujo, aŭdinte pri mia internepa transdono de mesaĝoj, proponis nomi min UEA-komisiito pri nepoj. Dum vi grincas la dentojn pro tiu malfilozofa ŝerco, memoru la version de la Majstro – la *nepoj vin benos* – kaj pretiĝu venontjare mediti pri filozofoj, kiuj rezolute malkredas je la kategorio de benoj.

Probal Dasgupta

Kiel verki por la gazetaro?

En la Kleriga Lundo de la Kopenhaga UK **Paul Gubbins**, la ĉefredaktoro de Monato, donis lecionon pri la arto verki gazetartikolon. Temis pri interaktiva leciono, ĉar anstataŭ prelegi Gubbins diskutigis la aŭskultantojn, por ke ili mem malkovru la trajtojn de bona artikolo.

La programero estis filmita por la Reta Kinejo de UEA. Oni oni povas nun vidi ĝin ĉu kiel unu kontinuan filmon (58 min.), ĉu en kvar ĉ. 15-minutaj partoj. Oni iru al la suba adreso por elekti:

<http://vimeo.com/album/1743043>

Paiva Netto

Meditadoj

El La Animo

:Recenzo:

Ĉi tre belaspekte aperinta ne spiritisma libro eldonita, publikigita estis julie en 2011, de *Eldonejo Elevação* [Plialtigo] en la 8-a Tutamerika Kongreso de Esperanto, kiu okazis en la urbo San-Paŭlo, Brazilo. La libron sinjoro Maria Aparecida Silva /Respondeculino de la Departamento pri Esperanto de Legio de Bona Volo (LBV)/sendis al mi tiupete, ke mi faru recenzon pri ĝi kaj aperigu en nia retrevuo. Ĉi-kaze mi plenumas lian peton. La aŭtoro José Paiva Netto; Brazilano estas tre multflanka homo: verkisto, ĵurnalisto, radiopreleganto,

komponisto kaj poeto. „Li naskiĝis je la 2-a de marto en 1941, Rio de Janeiro/RJ, Brazilo. „ Laŭ sur la librokovrilo interne aperintaj informoj de la eldonejo Elevação /apartenanta al la Legio Bona Volo/: ”li estas direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI-Inter), ano de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio de Janeiro, de Sindikato de Verkistoj de Rio de Janeiro, de Sindikato de Radiokomunikistoj en Rio de Janeiro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC). Ankaŭ partoprenas li en la Beletra Akademio en Centra Brazilo.

Kiel estro de Legio de Bona Volo ekde 1979, li multobligis programojn por Homa, Socia, Eduka Elvolvado en la Institucio, per ĝiaj modellernejoj. Reedukado kun Ekumena Spiritualeco, efektivigata per Pedagogio de Bona Volo, proponas ian novan lernomodelon, ligitan Cerbon al Koro. Ĝi enhavas esence du segmentojn: Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de Ekumena Civitano. ...

Alziro Zarur (1914-1979) la fondinto kaj unua direktoro de LBV diris, ke: „*LBV estas la Esperanto de la religioj, samkiel Esperanto estas la LBV de la lingvoj.*”

Je la 21-a de oktobro 1989, Paiva Netto inaŭguris en Brasília/DF, ĉefurbo de Brazilo, la templon de Bona Volo (TBV). Kaj flanke de ĝi, en 1994, li inaŭguris la Mondan Parlamenton de la Ekumena Frateco, Parla Mundi de LBV, konstruaĵon kiu kunformas arkitekturan ensemblon plej multnombre vizitatan en Brasília (ĉe Dombloko 915 Sude), laŭ la Sekretario pri Turismo de la Federacia Distrikto (Setur), ĉar ĝi jam akceptis ekde la inaŭguro pli ol 21 milionojn da pilgrimantoj.


Por disvastigi Spiritualan Civitanecon (la koncepto diskonigita de li); Paiva Netto kreis Superan Reton Bona Volo de Radio (Super RBV), TV-on Bona Volo kaj Reton Edukado kaj Estonto de Televido (Reeduki), TV-on Ekumenismo, krom la publikigaĵoj *Jesuo Alvenas!* kaj Bona Volo. Li estas ankaŭ aŭtoro de pluraj furoraj libroj, kun pli ol 4 milionoj da venditaj ekzempleroj, kaj krome verkis por plej gravaj ĵurnaloj kaj revuoj en la tuta mondo.

La 29-an de de junio 2011 li kompletigis 55 jarojn da servado al la LBV-afero.”

„Sinjoro Roman Dobrzyński, pola ĵurnalisto, dokumentfilma reĝisoro kaj esperantisto, estis vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio (1989-92) skribis pri Paiva Netto kaj pri lia libro: ”*Ankoraŭ fine de 1989, mi intervjuis la estron de la Institucio por la publika pola televido, kie mi laboris dum 30 jaroj. Tiam mi demandis lin, kiel LBV povas prediki Senliman Ekumenismon, se ĝi parolas pri Jesuo? Paiva Netto do respondis: „La granda tasko de LBV estas sensektigi Lin, ĉar Jesuo estas la Ekumena Kristo”.* Poste li finis: „*La Dia Majstro ... estas la Ĉiela Idealo de Homeco, Amo, Solidareco kaj Justeco por ĉiuj Homoj Enkorpaj kaj Spiritaj. Jesuo estas ia ĉiutaga alprenado por tiuj, kiuj soifas Scion, Fratecon, Liberecon kaj Egalecon, laŭ la Universala Leĝo de Reenkarniĝo. En Si mem, Jesuo ne konsistigas elementon por malamoj kaj militoj. Per Sia Nova Ordon, Li predikis Amon je ĝia senfina multoblo. Kion surteraj homoj faris per Lia Mesaĝo, tio estas ilia problemo (...). Elmontri la subliman signifon de Lia Evangelio kaj de Lia Apokalipso, sen sekto, jen estas elstara servo,*

kiun LBV plenumas por la monda socio (...).” „... Mi tre fieras, ke mia nomo priskribiĝis en la historion de Legio Bona Volo, precipe pro demando, kiun mi faris, kaj ĝi rezultigis die inspiritan respondon. Mi neniam povus supozi, ke tia ŝajne simpla demando fariĝos tiel grava kaj kondukos al artikolo verkita de Paiva Netto pri la Kristo Ŝtatisto, pri la Spirito de Senlima Ekumenismo, sub la titolo „Sensektigi Jesuon”. Tiun tekston publikigitan en pluraj lingvoj, per gazetoj kaj revuoj tra la tuta mondo, ankoraŭ hodiaŭ oni plu reproduktas per amaskomunikiloj. Post kvin jaroj, mi ĉeestis ankaŭ la inaŭguron de Parla Mundi de LBV, je la Kristnasko de 1994. Tie emocio prenis pli ol 100 mil homojn, kiuj ĉeestis la ceremonion.” „Ĝi estas belega konstruaĵo. ... Per la raporta filmo eblas vidi amason da Legianoj. Sur iliaj okuloj briladis larmoj de ĝojo, kiam ili salutis la belegan monumenton. En alia sceno, pilgrimantoj trairas la plankon konstruitan per granito kaj spirale desegnitajn, tiel, ke la homo kiu eniras la Navon de la Templo, laŭiras malhelkoloran vojon, kiu turniĝas en kontraŭhorloĝa direkto, kio reprezentas la malfacilan iradon de la Homo, serĉe de ekvilibra punkto. Tia introspekta irado kondukas la pilgrimanton ĝis la centro, sub la kristalon, metitan sur la pinton de la Piramido, kie ĝin ĉirkaŭas enigma lumo, kiu trairas la kristalŝtonon, kiun oni konsideras la plej grandan iam trovitan en la mondo. Sekve, li eniras novan iradon, prenante la helkoloran vojon, laŭ horloĝa turniĝdirekto, sur pado prilumata de spirita kaj moralaj konceptoj akiritaj per klopodado propra al la Homo, kio kulminas sur la Trono kaj Altaro de Dio, de Kiu li ricevas benojn....”

„... Nuntempe, do, estas neeble imagi la ĉefurbon de Brazilo sen tiuj du belaj arkitekturaj konstruaĵoj. Fakte mi povas aserti, ke dum mia vizito... tiu bloko de LBV ankoraŭ estis konstruata, kaj ... mi pensis:”Kiel vivigi tiujn grandajn murojn?” Nur post kelkaj jaroj mi trovis la respondon efektive. Paiva Netto kapablas starigi murojn, kaj ankaŭ vivigi ilin per sia spirito....Fine, indas ĉi tie reaserti la gravecon de la movado esperantista por la Homaro, kaj la fakton, ke Legio de Bona Volo estas unu el la saĝaj organizoj, kiuj laboras por tiu frateca idealo. Mi estas feliĉa, ke LBV pli kaj pli grandiĝas en sia nobla laboro, kaj kunportas Esperanton kiel multobligan elementon.”



De **Paiva Netto: Meditadoj El La Animo**, estis la unua libro, kiun mi legis de la fama verkisto, estanta ĝi esperantlingve verkita. La libro havas grandan avantaĝon pere de sia bela apero. Sur la abrikoto-kolora kovrilpaĝo oraj kaj nigraj literoj, ankaŭ interne: la, denstekstaj paĝoj estas samkoloraj kun blanka florvico aperanta supre, iaj ornamoj ĉiupaĝe, post la oranĝkoloraj aŭ blankaj inicialoj la nigraj literoj bele ornamas la oranĝkolorajn aŭ blankajn foliojn. La per tekstoj ne tute plenigitaj paĝoj faras nekutima la internon. Sed menciindas krome; ankaŭ la ellevitaj enkadratigitaj unu, du frazoj, la enmetitaj bildoj pri pentraĵoj ĉefe de la Eŭropa pentroarto, kiuj buntas la internajn trezorojn de la libro.



Kiuj kune kun kristalpuraj saĝdiroj de Jesuo, la bone elektitaj citaĵoj de filozofoj, militistoj, literaturistoj, kaj ceteraj famaj homoj de la homaro krom la priskriboj de iliaj vivovojoj faris la libron tre interesa antaŭ mi. Io tamen mankas el la libro: Ni ne scias kiu planis la konstruartistajn miraklojn, kaj kiuj estis la konstruentreprenistoj de tiuj admirindaj konstruaĵoj, kvankam ni scias, ke la ideo por konstrui tiujn, devenas mem de sinjoro Paiva Netto. Mi ne konas la verkaron, surprizas min la raviĝo de la esperantistaro pro la libroj de Paiva Netto. Ja, ĉi librojn povas legi eble nur la t.n.: mezklasanoj de la brazila socio. Ili povas konstati, ke la verkisto skribas pri ĉiu temo laŭvere, bone, kaj nepre semas la ideojn de la amo, kompreno, toleremo, paco, ja la socioj povas evolui nur inter pacaj interrilatoj. Surprizas min, ke la nun 70 jara aŭtoro kiel grandmezure aktivas ankaŭ nun, kaj kiomenergie gvidas sian institutaron, fondaĵojn. Li ne estas modestulo tirante sin en la malantaŭon, ja pri sia laboro li informas pere de siaj libroj eldonitaj multlingve kaj milionnombre al la mondo. Paiva Netto certe ankaŭ per ĉi sia verko – volas montri sian kredon, ke la kulpo punata estos iam. Li esperon donas al la homoj almontrante, ke ankaŭ en Brazilo ege multnombre vivantaj mizeruloj havos feliĉon en la transmondo, kaj la kontraŭhomaraj agantoj (militistoj, ekzekutistoj) gajnos sian punon jam ĉi monde, sed se ne, do en ilia sekva vivo certe, ja laŭ la Diaj leĝoj esprimitaj en la Ekumenismo, la reennaskiĝo bona okazo estos por tio. Paiva Netto metas antaŭ ĉion la moralon, la virton por gardi nian mondon por la estontaj generacioj. Atentindaj estas ankaŭ liaj ŝajne pastraj klarigoj aldonante al la aplikitaj citaĵoj. Por konatiĝi kun la esprimitaj pensoj de la verkisto larĝe konanta la vivdemandojn de la homoj, de la socio, de la pli grandaj religioj de la mondo kaj de iliaj profetoj, mi prezentas la malsupran elektadon.

Bhagavad-Gita (mistika, filozofia poemo en la Mahabharata de la Hinduismo): *„Ekkonas pacon tiu, kiu forgesis deziron.” – Kiam vi komprenas la sencon de abnegacio, tiam vi lernas ami. En tiu momento aŭtentika feliĉo kaptas vian koron*” – klarigas la verkisto Paiva Netto.

„**Talmudo** instruas (en la hebrea lingvo **tiu vorto** signifas studon, instruon, kio ellaborita estis inter la jarcentoj III-a kaj VI-a)”: *„Lernu unue scion, kaj nur poste mem faru.”*

„Bona penso konstruas feliĉan popolon; la negativa povas detrui ĝin. Tial estas esence grave prilumi la Animon de ĉiu homo. Ni notu ĉi tiun instruon de la **Korano**: *„Kiel parfumo estas esprimiĝo de floro, tiel same penso estas la parfumo de la spirito.... Plej forta estas tiu, kiu scipovas regi sin en momento de kolero.”*

„**Konfuceo (551- 479 a. K.)** diris:” *Estas malgranda diferenco inter homoj kaj sovaĝaj bestoj. kaj multaj homoj malpliigas tiun diferencon al nenio.*” „Antaŭ tiu aforismo de la

honorinda ĉina filozofo, sovaĝecon oni povas kompreni kiel leĝon de ferocaj bestoj, sed neniam de homo, kiu sin konsideras estulo racia kaj spirithava.” – klarigis la verkisto.

Kristo *diris:* ” *Per via persistado, vi savos viajn animojn*” (Evangelio laŭ Luko, 21:19)

Laŭ Plutarko (46-120) la saĝa greka filozofo: „Kuraĝo ne estas fanfaronado. Ĉiu fanfaronulo estas malkuraĝulo – klarigis la nun sekvantan frazon la aŭtoro. „*Vere kuraĝa homo ne serĉas danĝerojn.*”

Vortojn de **Luc de Clapiers, Markizo de Vauvenargues (1715-1747):** ”*Ne povas esti justa tiu, kiu ne estas humana.*” – jene klarigas Paiva Netto: ”La stato de morala malforteco en la mondo estas tiel granda, ke por estingi perfortecon ekzistas nur unu forta kuracilo: tiu de klopodado por Frata Amo, kune kun Justeco, en Edukado. Pro trio, ekumene spiritualigi instruadon estas potenca kontraŭago kontraŭ agresemo. Se paroli pri la „Sinjorino kun Vidintaj Okuloj”, jen estas ilustra penso de la franca eseisto Luc de Clapiers, Markizo de Vauvenargues.

Abraham Lincoln (1809 – 1865) *diris:* ” *Kiam mi agas per Bono, mi sentas min bone, kiam mi agas malbone, mi sentas min malbone. Jen, mia religio.*”

Eli Stanley Jones (1884-1973) profesoro kaj metodista misionisto jene edukis: „*Mi ne havas malamon, nek resentojn (...). Malamo estas ia veneno, kiun ni devas forigi de niaj vivoj.*”

Pensoj de la aŭtoro:”*Defioj en la ekzistado puŝas nin al sukceso. Sed necesas ankaŭ, ke iuj estu optimismaj kaj grandanimaj, por ne fali inter la ungegojn de detrua egoismo... La paco de la homoj estas ankoraŭ nun la paco de lupoj kaj de kelkaj malprudentaj frenezuloj, kiuj gvidas popolojn sur la Tero. Paco, la vera Paco, naskiĝas unue el la pura koro de Homo... La koro estas mikrofono kaj laŭtparolilo preferataj de homamasoj... La koro fariĝas pli aŭskultema, kiam Amo estas la fundamento de la Dialogo... Paco regos en ĉi tiu mondo nur kiam la Homo fine komprenos kaj akceptos, ke ĝi povos burĝoni nur en sublimiĝinta koro de la homoj. Ĉio cetera estas tio, kion oni daŭre vidas, forte cerbaj ideologioj, laŭmodaj en sia tempo, kies ĝeneralan konsekvencon Vi konas; multe da espero kaj nekontentiga rezulto. Necesas do kunigi cerbon kaj koron... Kiam ni preĝas la Animo spiras kaj fekundigas la homan vivon. Preĝi estas esence, por sennebuligi la horizonton de la koro... Nenio estas pli efektiva ol frata alproksimiĝo al la koro de homoj. Ĉio cetera estas burokratio, bona aŭ nebona....Venos iam tago, kiam armiloj fine havos siajn hororajn voĉojn silentigitaj. Ankoraŭ en la Tria Jarmilo, eĉ se tio postulos longan tempon, Homoj komprenos, ke la esenco de povo ne troviĝas propre en ili mem, sed en la spirito de Solidareco, kiu devas kunfratigi ĉiujn homojn. Multo ankoraŭ estas farenda. Do, ek al la laboro! La tempo ne haltas por atendi ies ajn humoron....Karitato estas Paco al ĉiuj kaj Paco al si mem....Rasismo estas maldecaĵo (same kiel sociaj, religiaj, sciencaj aŭ iaj aliaj antaŭjuĝoj). Ĝi vundadas ne nur la penadon de la nigra etno, sed ankaŭ la penadon de blankaj malriĉuloj, de indianoj, de enmigrintoj... Necesas forigi ĝin, ĉar en ĝia interno aperas teruraj specoj de persekutado, kiuj malfaciligas la starigon de Paco sur la planedo....Neniu elvoku la rajton je venĝo, sed je Justeco...Nenio estas pli vera, ĉar venĝo perturbas la Animon de venĝanto, en ĉi tiu aŭ en la Alia Vivo.”*

Pietro Ubaldi skribis: „*La granda kvalito de Brazilo, tiu kiu starigas ĝian vitalan funkcion, estas la sento, la koro. En ĉi tiu lando kuŝas la radikoj de tiu disvastiĝado de estimoj, kiujn estras la homa kvalito, kiu poste evoluos kaj estos la plej kapabla sublimiĝo al evangelia amo.*”

Laŭ la aŭtoro: „*Jesuo estas forta mesaĝo de espero en tempo de grandega seniluziiĝo por multaj homoj.*”

Recenzis, la citaĵojn kompilis: sinjorino Adrienne Pásztor, D+FD de UEA

Gravaj informoj kurte

La Miŝkolca Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos” de la 1-a de novembro 2011. **Ĉiudimanĉe posttagmeze** kunvenas /inter la horoj 15 kaj 16,30a/ por laŭtlegi Esperantlingvan literaturajon. Informoj ĉe s-ino Adrienne Pásztor, rete: <http://kiralylajos.uw.hu>, aŭ telefone: +36 70 570 8895.

Ĉiumonate la unuan merkredon inter la horoj 10 kaj 12a, malfermitan tagon funkciigas pri la Kolektaĵo Fajsz, la Landa Fremdlingva Biblioteko en Budapeŝto. Antaŭa anonciĝo necesas! Por eksterlandanoj ankaŭ alitage eblos la vizito, sed ankaŭ tiukaze anonciĝu ĉe Anikó Nemes. Retadreso: nemes.aniko@oik.hu

Kvankam pasis jam ĉi jaro, ni aperigos nian revuon ankaŭ en la sekva jaro. **Mi petas vin, serĉu por legi nian gazeton ankaŭ en la Biblioteko OIK de Budapeŝto**, ke ĝi ankaŭ en 2012 volu deŝuti ĝin kaj meti antaŭ la legantojn. Alitake nia revuo ĉesos plu ĉeesti tie. Serĉu, petu ĝin ĉe info@oik.hu kaj en la Elektra Biblioteko de Biblioteko Széchenyi de Budapeŝto ĉe info@mek.oszk.hu

(Adri Pásztor)

Jozefo E. Nagy; unu el niaj reviziantoj estas rekonata poeto en Bukureŝto, Rumanio. Vidu lian paĝon <http://www.ipernity.com/home/199659>

Jen, poemo de Kurzens <http://www.ipernity.com/blog/199659/353843>

(B.Wacha-A.Pásztor)

Diafilmoj rigardeblas sur paĝo de Tibor Kristály <http://espleono.uw.hu/index.html>

(Tibor Kristály)

Vojaĝo al la UK en 21012 en Ĥanojo, Vjetnamio <http://vojagxo.info/2011/09/17/lau-transsiberio-en-hanojo/> El <http://vojagxo.info/>
<http://vojagxo.info/wp-content/themes/mimbo2.2/images/logovoj.png>

(Leopold Patek/Tibor Kristály)

Vidu bonan artikolon pri la eldonejo FONTO en la decembra numero de LA ONDO DE

ESPERANTO: <http://sezonoj.ru/2011/11/fonto/#more-1660>

Aloísio Sartorato



Kaktoj - Foto de s-ino Adri Pásztor

Citaĵoj de Jan Werich

En nia septembra revuo mi skribis jam pri la fama ĉeho, do nun mi aplikas de li nur la subajn citaĵojn:

La memoro estas privilegio de la stultuloj. La saĝulo ne havas tempon memori, li devas eltrovi novaĵojn.

La homo neniam ploranta, ne vivis veran vivon.

Estu bonhumuraj. La bonhumuro ne solvas la problemojn, sed agacas tiom da homojn ĉirkaŭ vi, ke jam pro tio meritigas apliki ĝin kiel metodon.

La televidilo ne estas malamiko. La TV-n oni povas malkonjekti.

Malgaja afero estas, ke la juneco iam forpasas, sed se tamen restas en nia koro, ne restas en niaj genuoj...”

El la hungara teksto esperantigis s-ino Adri Pásztor

Antaŭ 120 jaroj naskiĝis d-ro Kolomano Kalocsay

Por omaĝi al d-ro Kolomano Kalocsay, kiu naskiĝis antaŭ 120 jaroj ni kolektiĝis en lia naskiĝloko: Abaújszántó en Norda Hungarujo, la 6-an de oktobro 2011.

Ni la festantoj renkontis unu la alian unue en la Kulturdomo Petőfi Sándor (Aleksandro Petofi), kie atendis nin la urbestro kaj la kulturdomanoj kun salaj kukoj, refreŝigaj trinkaĵoj, kafo, kaj freŝe presitaj koloraj prospektoj pri Abaújszántó. La prospektojn eldonis la urbestro, la tekstojn kompilis s-ino Beáta Szúnyog, freŝe diplomita pri lingvoscio de Esperanto.

Kiam jam ĉiuj aliĝintoj alvenis, ni trairis en la Lokhistorian Muzeon, en kies korto estis starigitaj unu apud la alia urboflago, kaj hungara flago, la Eŭropunia flago kaj ĉiufanke unu Esperanto flago. Apude staris sub la memorpiceo: sinjoro urbestro György Madár, s-ino Adri

Pásztor, s-ro Imre Szabó, s-ino Anna Bartek (Anjo Amika), popolkantisto kaj urba poeto István Nagy kiel la unuaj rolantoj de la solenaĵo. Vid-al vide staris cirkle la partoprenantoj.



La urbestro Georgo Madár – Parto de la partoprenantaro



Salutparolas s-ino Adri Pásztor

Post aŭskulto de la Himno Esperanta parolis la sinjoro urbestro pri vivo kaj verkaro de doktoro profesoro Kolomano Kalocsay. Sinjorino Adrienne Pásztor parolis pri tio, kial ĝuste en Abaújszántó estis preparitaj la memorlokoj pri nia granda esperantista verkisto, poeto, arta tradukisto, kuracist-profesoro. Ŝi faris mencion pri la salutmesaĝoj alvenintaj por saluti kaj gratuli la organizantojn, la rolantojn de la programoj kaj la ĉeestantojn. Mesaĝoj alvenis de s-roj: doktoro profesoro Humphrey Tonkin el Usono, de Herbert Mayer de la Aŭstria Nacia Biblioteko -Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko de Planlingvoj, nome de la bibliotekistoj, de Leopold Patek: ĉefdelegito de Aŭstrio, de prezidanto de la Fervojistaj Esperantistoj :Jindřik Tomíšek el Ĉeĥujo, de Bronislav Ĉupin el Udmurtio (de la lingvoparencoj de la hungara lingvo) kaj de la rabeno sinjoro Tivadar Löwenkopf el Israelo de la Jordano. Post la evento alvenis mesaĝo de s-ino Barbara Pietrzak. La mesaĝoj belsonaj estis kaj ĝojdonaj, honorigaj. Mi dankas ilin en ĉies nomo.

Sinjoro Imre Szabó prezidanto de HEA, lerte atentis la antaŭ li parolantojn, kaj li rakontis pri tiuj datumoj pri vivo de d-ro Kolomano Kalocsay, pri kiuj la pli fruaj parolantoj nenion diris. Tiel sukcesis eviti, ke certaj indikoj ripetiĝu.



Salutparolas Imre Szabó prezidanto de HEA.

Ĉiu parolanto diris iun novaĵon. La paroloj tiel iĝis multflanke koloraj. Lian parolon sekvis neimiteble belega esperantlingva kantado de hungaraj popolkantoj, pere de s-ino Anjo Amika. Ŝia esperantlingva kantado estis bona ekzemplo antaŭ la neesperantistaj ĉeestantoj kaj parencoj de d-ro Kolomano Kaloĉay, kiel matura estas la internacia lingvo.



Kantas s-ino Anna Bartek/Anjo Amika

La kantadon sekvis vizitado de la Kalocsay-memorĉambro kaj de la aliaj muzeaj ĉambregoj.



Detaloj de la ĉambro Kalocsay

La dua fazo de la festo okazis ĉe la busto de nia granda sampatrujano. Tie ni povis sperti, ke la regule nian lingvon nelernantaj ok jaraj infanoj kiel bele, lerte prezentis dulingve versaĵajn fabelojn esperantigitajn de d-ro Kalocsay.



Fotoj de s-ino Anna Bartek kaj de s-ro László Pásztor

La urba popolkantisto unue prezentis sian poemon porokazan, poste aliajn hungarajn popolkantojn.

Sinjoro Wacha de la Societo Kalocsay vigle kaj bonhumuron igante parolis pri sistemigo de la vortoparoj en la Esperanto gramatiko, pere de d-ro Kolomano Kalocsay. Poste okazis la florkronado, meĉobruiligado ĉe la busto, kaj la komuna fotado parte de kaj pri la ĉeestantoj.




Ĉe la tabulo s-ino Margit Evva kaj la muzikisto - Foto de s-ino Anna Bartek

La tria fazo de la programo, okazis stratangule de la strateto Kalocsay, antaŭ la memortabulo estanta surmure de la supozita iama domo de la familio Kalocsay. Tie sinjorino Adri Pásztor rememoris unue pri la iamaj, la pioniraj esperantistoj de Abaújszántó kaj pri Barnabo Batta prezidanto de la iama BAZ departementa Esperanto Komitato. Sinjorino Adri Pásztor rakontis ankaŭ pri tio, ke la unuajn spurojn de la familio Kalocsay esploris sinjoroj d-ro László Molnár

kaj Barnabo Batta. Menciita estis ke d-ro László Molnár, la unua esperantisto en la urbo, kiu esperanto-lingvokursojn gvidis inter la jaroj 1981.kaj1982, sed post lia transklokiĝo en urbon Sárospatak el la entuziasma 20 membra grupo preskaŭ neniu restis. Tamen ĝojinda estas, ke la instruistino s-ino Ildikó Széphalmi al la nuna festo instruis la 15 infanojn, kiuj bele rolis montrante, ke la instruistino tre lertas. Tamen ni bedaŭras, ke ŝi regule ne instruas la internacian lingvon, estante ŝi pensiulino. Ŝi finante multajn aliajn kulturajn farendaĵojn, nehavante helpanton en la instruado, ankaŭ ĝin entrepreni jam ne scias, kvankam la elementa lernejdirektorino volonte instruigus la gelemnantojn por fundamentigi la lingvoscion antaŭ komenco de la anglalingva instruado.

Same parolis ĉe la tabulo s-ino Margit Evva, kiu estas prezidantino de la Encs-urba Lokhistoria kaj Patrujkoniga Asocio. S-ino Margit Evva rakontis ankaŭ pri sia memoraĵo pri doktoro Kolomano Kalocsay. Ŝi alvenis kun la parlamenta deputito de urbo Enĉ, kaj ili florkronis. Florkronis ambaŭloke la urbestro de Abaújszántó, HEA d-ro Ernesto Gaál prezidanto de Societo de la Montosubaj Kreantoj (verkista societo) el urbo Szerencs, la Elementa Lernejo de Abaújszántó, la Societo Kalocsay, s-ro István Mészáros je la nomo de la KEA, s-ro László Pásztor je la nomo de la Esperanto Amika Rondo Miskolc, kaj de la Amikeco Esperanto-Asocio s-ro Jozefo Eszényi, Jozefo Gulyás el urbo Ózd, Ernő Könczöl el urbo Eger. Se ni rigardas la florkronantojn, ni povas konstati, ke la tuthungara esperantistaro estis tie reprezentata, el urboj de duono de Hungario, de Abaújszántó ĝis Budapeŝto.



En la tombejo – Fotis s-ro László Pásztor

Post la florkronado ni povis aŭskulti la blovinstrumentan prezentadon de belegaj popolkantomuzikoj pere de sinjoro István Ringler el urbo Szerencs. La lastan muzikon ni kune kantante akompanis. Ĝi estis la hungara preĝo, la proklamo de Vörösmarty.

Je tempo de la irado en la publiktombejon, mi jam ne povis marŝi pro pied-doloroj. Min portis la urbeŝtrara aŭto. Tiam anstataŭigis min mia edzo Ladislao Pásztor, kiu alten tenante la niakluban esperanto-flagon gvidis la venantojn al la tombeja pieta vizito. Tie mi parolis pri tio, ke s-roj Jozefo Lénárt, Barnabo Batta kaj D-ro Ladislao Molnár serĉis la tombon de la patrino de d-ro Kolomano Kalocsay, kion signas granda nigra marmorobelisko preparigita de mem de la filo, tamen trovi ĝin en la tomebejo estis tasko de la tri esperantistoj. Barnabo Batta eksciis, ke kaŭzo de morto de la patrino Jolán Panda estis la tn. cerboinflamo, kiu tiutempe estis notita kiel mortiga malsano. Ni surtombigis niajn florkronojn, bruligis meĉon, esperantlingve preĝis la Patro Nia-n. Per tiu ago finiĝis la oficiala parto de la programo. Poste ni povis tagtmanĝi en la loka restoracio, kiel gastoj de la urbeŝtraro. Dankojn nianomajn pro ĉi komplezo.

Mi devas mencii, ke estis kelkaj, kiuj pli multe oferis, ol tiuj, kiuj vojaĝis aŭtobuse aŭ trajne. Ja el inter ili du malfrue vekiĝis kaj por atingi la necesan trafikilon ili jam ne sciis. Do: d-ro Ernesto Gaál, atingis urbon Abaújszántó per taksio el urbo Szerencs. Sinjoro Jozefo Gulyás (kormalsanulo) vojaĝis per motorbicycle 200 kilometrojn tie-reen por atingi nian feston. Geedzoj Parkánszki el urbo Miskolc vojaĝis pere de ili luita malsanulojnportanta aŭtomobilo de la Servo Por Movorganaj Gemalsanuloj en Miskolc. Tiu aŭtomobilo portis la puŝĉaron de s-ino Suzana Parkánski, kiu nenimaniere volis resti hejme en Miskolc. Ŝi, nia amikrondanino unue partopreni, poste rememori volis ĉi eventon. Mi dankas al ili ilian entuziasmon kaj grandan oferon esti kun ni, por kune partopreni ĉi belan eventon.

Post finiĝo de la programo kun gaja parolado ni pasigis la tempon ĝis nia adiaŭo, kiam ni hejmeniris sed konstatis kiel bela estas la senegoisma agado por la komuna celo, Esperanto. Bela estas la unueco de la geesperantistoj de nia lando Hungarujo zonitaj kun niaj geamikoj en la mondo.

Raportis: s-ino Adrienne Pásztor, el Miskolc, Hungarujo

Lulkanto: Dormu milde

Suno moŝta post minuto,

Diofana gemrubeno,

Riverencos kun saluto

Al la nokta suvereno.

Luno brila el sateno

Jam arĝenta en ĉielo.

Ĉio mutas en sereno.

Dormu milde, brilas stelo.

Infanetoj dum balbuto
Time ploras sen ĉagreno
Trankviligas ilin fluto
Kaj fabelo pri delfeno.
Kaj malantaŭ la kurteno
Kvankam regas la malhelo,
Ili kuŝas sur kuseno.
Dormu milde, brilas stelo.

Nek diskuto, nek disputo,
Foren pluas la promeno
En kupeo aŭ kajuto
Trans la monto ĝis haveno.
Morgaŭ floros la mateno,
Belos kiel akvarelo,
Sed silente nun sen ĝeno
Dormu milde, brilas stelo.

/ Teksto: Marcelo Redoulez, muziko de la kreaĵo (kiu ne estas aŭdebla nun): Nanne Kalma,
muzikistaro:: Kajto./ Lenyvargas@gmail.com – La sendinto estis: Jindriška Drahotová-Cz/

Antaŭ 120 jaroj naskiĝis Julio Baghy



Tombon de Julio Baghy fotis s-ro László Pásztor, dum oktobro de 2011.

„Saluton kara Adrienne! Bonan tagon!

Vi tute ne devas peti pardonon, mi tre ĝojis ricevi vian mesaĝon permesantan al ni amike interkonatiĝi: ĝuste tiucele Esperanto ekzistas.

Unue, gratulojn pro via retejo, pro via bela kaj bonege prizorgita informilo "Nordhungaria Informo" kaj pro via interese trafa prezentado de via ŭrbo kaj esperanta asocio

Pri via peto, mi certe kaj plezure donas al vi mian senliman permeson uzi mian filmeton (kaj se necesas, ĉiujn aliajn) kiel kaj kie vi deziras.

Due, laŭ via peto, jen kelkaj informoj pri mi mem kaj mia foto, kiujn mi kutime, iom malmodeste, uzas por la sociaj retejoj:

Gian Piero SAVIO

(mallongige: GoPoSo, ĝuste kiel la fama birsistemo, kiun mi tamen antaŭis je pli ol 50 jaroj!).

Mi estas italo kaj israelano; doktoro, universitata ekspreganto kaj eksprofesiisto pri informadiko; dufoja avo. Jam en 1965, ĉe la itala firmao OLIVETTI, mi partoprenis la realigadon de "Programma 101", plejverŝajne la unua persona komputilo en la mondo.

Ekde 1975 mi loĝas en Israelo, kie esperantistiĝis en la jaro 2000; ekde tiam mi ekspluatadas mian sperton pri komputiko por disvastigo kaj antaŭenpuŝo de Esperanto, kiel movada aktivulo, instruisto kaj evoluigisto de didaktika programaro. Kvankam ankoraŭ ŝatante komputilaĵojn mi tamen ne plu tro freneziĝas pro ili.

Ekde 2007, post mia emeritiĝo, mi eklernis filmfaradon kaj filmmuntadon kaj interalie, krom partopreni en la produktado de programoj por nia komunuma televidkanalo, produktadas buntajn poresperantajn kaj priesperantajn filmetojn spekteblajn en la jenaj interretaj filmaj kanaloj:

<http://www.vimeo.com/goposo> kaj <http://www.youtube.com/wwweee2000>

Volontule mi instruas komputikon kaj Esperanton, kadre de asocio "Amiko de edukado", en lokaj bazlernejoj, gvidante riĉigajn rondojn nomatajn "Internacia Komunikado" kaj bazitajn sur Esperanto.

Mi enkondukas en bazlernejojn ankaŭ la japanan ludon IGO (internacie GO), interalie per helpo de la japana kartuna ("anime") serio "Hikaru no Go"; ĉi-cele miaj familianoj kaj mi jam dublis en la hebrea la unuajn dek partojn.

Kvankam plene kontenta pri mia familia kaj socia vivo, aparte pri miaj du junaj genepoj, mi tute ne estas kontenta pri tutmondaj maljustaĵoj ĉefe pri lingva diskriminacio, do, ĉe la limoj de mia eblo, kun eksmodiĝinta idealismo, daŭre klopodos per Esperanto plibonigi la mondon.



Gian Piero Savio

Mia edzino (Adriana!) kaj mi pasigis, je la komenco de majo, du belegajn semajnojn en (Buda)Peŝto en la loĝejo de mia duagrada bokuzino en la XII. distrikto apud la Danubo, norde de Margareta insulo: belega ĉirkaŭaĵo kaj belega urbo! Mi sukcesis filmi ankaŭ kelkajn spurojn de Julio Baghy, kiujn mi uzis en la filmeto:

"Sur la spuroj de Julio Baghy en Budapeŝto" <http://vimeo.com/25273503>

Antaŭ la veturado, mi investis iom da tempo por iomete lerni vian malfacilan sed fascinan lingvon.

Ne povas diri pri mia baza hungara konversacio, ke "mindben rendben" kaj "semmi baj"/nenia malbono, tamen sufiĉe por preskaŭ neniaj paroli angle! Bonege! Jes, vi pravas, mi antaŭe ne rimarkis la fakton, ke ĉijare estas la 120-a naskiĝdatreveno de Baghy kaj Kalocsay, kaj pro tio mi ankaŭ pli ĝuas, ke mi faris la filmeton ĝuste nun!

Mi kore salutas vin kaj gratulas pri via esperanta agado.

Amike kaj Esperanto-sente,

Gian Piero Savio"

Roman Dobrzyński

Krozanta Babelturo

Siatempe en Panamo mirigis min multetaĝa domego, kiu ŝoviĝis tra la plata tereno, simile al la monto transportata per la forto de kredo. Fakte tio estis turisma ŝipo en la Panama Kanalo. Ĝi anoncis novan koncepton de turismo, nome la krozadon sur varmaj maroj ligitan kun vizitado de survojaj mirindaĵoj. Mi mem ekdeziris sperti tiuspecan kombinaĵon de ripozo kun perceptado de la mondo. Tiu ĉi revo realiĝis danke al “Esperantotur”.

En la flughaveno de Parizo al Santiago de Chile al la pola dekopo aliĝis la rumana esperantistino Rodica Todor, parenteze prezidanto de IFEF – Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. La dutaga vizito al la ĉilia ĉefurbo sufiĉis por aklimatizi al la sudamerika somero kaj horaro. Transportitaj al la haveno de Valparaiso, ni devis alten direkti la rigardon por vidi la nomon de la giganta ŝipo Star Princess kaj ĝian flagon de Bermudoj, kie la ŝipo estas oficiale registrita. Ĝi apartenas al la supernacia kompanio Cruises Princess. Nia Star, kiun ni baptis Verda, estas giganta ŝipo de 109 mil tunoj. Ĝi povas transporti 2600 pasaĝerojn kaj 1200 membrojn de la laborpersonaro.

La ŝipo longas 280 metrojn. Oni povas ĉirkaŭiri ĝin laŭ la sepa “promenferdeko”, enspirante la jodhavan aeron. En la sama etaĝo troviĝas kvar luksaj restoracioj, kie oni servas vespermanĝojn ĉiam en eleganta stilo kaj je fiksita horaro. La plej vizitata estas la 14-a ferdeko kun multaj bufedaj restoracioj kaj memservaj manĝejoj. Ili funkcias ekde frumateno ĝis noktomezo. Eblas tie manĝi kiam ajn kaj kiom ajn, ĝuante varian menuon. Tamen necesas aparte pagi alkoholaĵojn. Mono ne estas uzata. Enirante la ŝipon, oni deponas minimume 300 usonajn dolarojn kaj ricevas kreditkarton, per kiu oni kovras ĉiujn krompagojn.

Sur la 14-a ferdeko troviĝas ankaŭ du naĝejoj kaj pluraj rondaj kuvoj por ĝui akvomasagon. Ambaŭ naĝejoj ĉirkaŭas multaj faldseĝoj por kuŝado. Oni preferas uzi la 15-an “sunferdekon”, por brunigi sian haŭton. La 16-a nomiĝas “sportferdeko”. Ĝi ofertas komfortajn lokojn por gimnastiko kaj ludoj, krome maŝinojn por fizika ekzercado. Unu etaĝon pli alte estas saŭno, masaĝejo, salonoj por fizika kaj aliaj terapioj. Ne forgesante la medicinan centron en la 4-a ferdeko, oni rajtas nomi la ŝipon surmara sanatorio.

Tiom pri la korpaj bezonoj. Kaj la spiritaj? Ĉiuvespere okazas spektakloj en la teatro kun 1500 lokoj; la kinejo prezentas kelkajn filmojn dum unu tago, preskaŭ senĉese oni povas aŭskulti diversajn specojn de muziko. Aparte ŝatata estis ĉiutaga tangodancado fare de la argentina paro Fernando kaj Cecilia. Fanatikuloj de telenoveloj povis rigardi ilin en siaj ĉambroj pere de satelita televido, kiu cetere ofertis amason da aliaj programoj. La ŝiptelevido senĉese transdonis aktualajn informojn pri la krozado kaj prezentis ĉiujn vizititajn kaj vizitotajn lokojn. Ekskursoj montriĝis eble la plej grava aspekto de la turisma krozado.

La 26-an de januaro 2011 vespere nia ŝipo forlasis Valparaison kaj direktis sin suden preter la orienta bordo de Ĉilio. La sekva tago pasis sur trankvila Pacifiko, sub la forta suno kaj varma tamen ĉiam pli ventema aero. Scivolemuloj esploris la internon de la ŝipo kaj sentis admiron al la Italoj, kiuj ĝin konstruis. Aparte ravas la interna trafiksystemo. Ĉiun ferdekon oni povas

rapide atingi per multnombraj liftoj, kvankam mi preferis grimpi laŭ la vastaj ŝtuparoj, por bruligi superfluajn kaloriojn.

La 29-an de januaro frumatene la pasaĝeroj amase invadis la suprajn ferdekojn de la ŝipo, ankrita en profunda fjordo, por admiri la majestan glaĉeron Amelia, kies klifa frunto etendiĝas vertikale je cent metroj super la marnivelon. La ŝipo daŭrigis sian fjordan itineron inter la altaj montoj neĝkovritaj kaj eniris la Magelan-Markolon. Ĝi haltis eksterhavene kaj la pasaĝeroj spertis aventuron transportiĝi en ŝalupoj al la plej suda ĉilia urbo Punta-Arenas, kiu estis elirpunkto de ekskursado al diversaj lokoj de la subantarktika regiono. La plej atrakcia celo montriĝis kolonio de pingvenoj, ĉiam amuze scivolemaj.

La sekva etapo estis Kanalo Beagle kaj Ushuaia, la ekstreme suda urbo de la terglobo, la “mondofino”. Sed la ŝipo veturis ankoraŭ pli suden kaj ĉirkaŭiris la faman Horn-Promonton. Tiamaniere dum kvar tagoj ni trifoje trapasis lokojn, en kiuj tuŝas sin Pacifiko kaj Atlantiko. Tiuj solaj naturvojoj inter ambaŭ oceanoj havas gravan strategian signifon kaj kaŭzis plurfoje militajn konfliktojn, kiuj latente plu ekzistas. Plidanĝerigas ilin la problemo de Falklanda-Malvina arkipelago, kiun posedas Britujo, sed ties proprietulo konsideras sin Argentino. Feliĉe nia vizito ne kaŭzis militon, kvankam pasaĝeroj de nia ŝipo, kiuj “invadis” la insularon, estis pli multaj ol ĉiuj ĝiaj loĝantoj.

La atlantika etapo de la vojaĝo daŭris ses tagojn, plej longe en la plena maro, trankvila kaj suna. La 9-an de februaro ni atingis havenon de Rio-de-Ĵanejro, vizitinte pli frue Bonaeron kaj Montevideon. Tra Rio, prepariĝanta al la karnavalo, kompetente gvidis nin la esperantistino Rosana Carames. La neesperantista parto de nia grupo havis okazon konfirmi la konatan onidiron: “Per la angla oni interkompreniĝas, sed per Esperanto oni krome amikiĝas.”

Nia ŝipo vere similas la Babelturon. Mi parolis kun multaj pasaĝeroj kaj ŝipanoj. Laŭ mia provizora kalkulo ili reprezentis proksimume 40 landojn kaj pli multajn lingvojn. La oficiala lingvo estis la angla, sed en la praktiko samrange funkciis la hispana. Cetere la plimulto de la servistaro devenis el Latin-Ameriko kaj la alian grandan grupon formis orienteŭropanoj, aparte ukrainanoj, kun kiuj ni povis interkompreniĝi pole aŭ ruse. Ŝajnas al mi, ke tiu ĉi “babela” etoso kaj komfortaj vivkondiĉoj de la ŝipo perfekte taŭgas por Esperantaj-aranĝoj, kiuj samtempe plenumus propagandan rolon rilate al aliaj pasaĝeroj kaj ŝipanoj, prezentante la modelan solvon de la lingva problemo.

/info@esperanto.bydgoszcz.eu/

35a Hungaria Esperanto-Kongreso



Szolnok, 03-06 novembro 2011/ Urboparto

La foton sendis s-ro János Nagy; ekonomia vicprezidanto de HEA



Sinjoro Imre Szabó: prezidanto de HEA inaŭguras la Landkongreson:

<http://www.ipernity.com/doc/anoj/album/255639>



Foto de Johano Nagy de HEA

La 35an Hungarian Esperanto-Kongreson kune kun mia edzo, mi partoprenis nur unu tagon pro kaŭzoj ĉi tie ne priskribendaj. Do la 5an de novembro ni povis partopreni diversajn prelegojn.



Torto de la Landkongreso – Foto de <http://www.ipernity.com/doc/anoj/album/255639>

Menciindas, ke samtempe plurloke okazis programoj, libroservo kaj diversaj prelegoj. Mi ĉeestis la prelegserion en la ĉambro Baghy. La unuan mi aŭdis de sinjorino **Katarina Faragó** pri la de ŝi aranĝitaj kongresoj pri medicinterapiaj masaĝoj. Poste la historia rerigardo okazis pri la IMEK Kongresoj, de **doktoro Imre Ferenczy**. Ambaŭ prelegoj interesaj estis, sed iom

kovris unu la alian. **Doktoro Endre Dudich**, profesoro de geologio ankaŭ nun bonege prilaboris sian tre bone elektitan temon aldonante al la prelego ankaŭ fakteritoriajn bildojn. Finante li disdonadis sian prelegtekston, kio estis bona ideo, ja hejme ni havis ŝancon denove tralegi eĉ gardi ĝin. Ni povis konstati kia kolora povas esti la scienco de geologio kaj kiel riĉa estas la Karpat-baseno el geologia vidpunkto.



Endre Dudich prelegas



Prelegas Ottó Haszpra



Proponatas legi la tradukaĵo

Fotis: László Pásztor

Poste li prezentis la traduk-verkon de **sinjoro doktoro Otto Haszpra**; ano de Esperanto-Akademio. Profesoro Ottó Haszpra membro ankaŭ de la Hungara Scienca Akademio, tradukis la hungaran romanon: *Nigraj Diamantoj*, verkita de la granda fabelisto *Mór (Maŭrico) Jókai*. Profesoro Ottó Haszpra poste hungarlingve klarigis al ni kial li uzis en sia ĉi traduko aliajn literojn anstataŭ la Zamenhofaj originalaj ĉapelitaj. Dudek ekzemplerojn li transdonadis al la pri ĝi interesantoj por prijuĝi ĉu ne estus pli facila uzi la de li divenitajn neĉapelitajn literojn anstataŭ la Zamenhofaj ĉapelitaj en la literaturaj tekstoj. Ankaŭ lia prelego estis grandvalora, nur bedaŭrinde la eksterlandaj kongresanoj nekompreneble la hungaran parolon foriris pro senintereseco. Sinjoro doktoro Ottó Haszpra promesis al mi, ke la tutan esperantlingvan tekston de lia hungarlingva prelego li trasendos al mi por aperi ĝin en nia retgazeto marta en 2012. Post lia prelego sekvis paŭzo por tagmanĝi en la kolegio estanta ĝi tre proksime al la Kulturdomo - apud la fervoja stacidomo. Vere, la kongresejo estintis agrabla ejo, sed ne estis hejtita. Post la tagmanĝo ni finaŭskultis prelegon de sinjoro **Johano Petik** pri la Koncepto de alternativa strategio de la hungaria esperanto-movado. Ankaŭ li bonege, parkere parolis skizante la nunan staton de la hungaria esperanto-movado. Poste ĝis nia foriro al la stacidomo, ni paroladis kun la gesamideanoj babiladante starantaj sur la koridoro rigardante instrulibran kaj DVD-an ekspozicion de sinjoro **Stano Marček** el **Slovakio**. Dume mi povis paroladi ankaŭ kun la kongresanoj el **Ukraino, Svisio, Rumanio kaj Kubo**.





La fotojn pri la inaŭgura kulturprogramo sendis s-ro János Nagy de HEA

El la eldonita kongreslibro mi sciigis, ke la 35an Hungarian Esperanto Landkongreson **partoprenis 81 geesperantistoj**, kvankam mi aŭdis, ke dum la Inaŭguro nur la duono de la kongresanoj ĉeestis. Jam hejmenveninta mi legis rete la informon, ke la **Urba Televidilo** famdonis pri nia E-kongreso surmontrante la fakton: "... kiu ellernas la lingvon Esperanto, pli facile lernos aliajn lingvojn..." La programoj de la kongreso variis. Okazis prelegoj ankaŭ pri doktoro Kolomano Kalocsay kaj Julio Baghy, preleginto estis **Jozefo Eszényi**. Do, kiel kutime okazas, inter; la programoj estis pli preferataj, pli ŝatataj por ĉiujaruloj: kaj junularaj kaj instruistaj, kaj aliaj interesajoj.



Ŝtonpeco de ekspozicio de s-ino Orŝika Kiŝ

Por mi pli agrabla estintus, se inter la tre seriozaj prelegoj estintus iom faciliga muzikprezentado, aŭ kantado. La ĉeforganizanto estis: s-ro Ferenc Harnyos. Sed gravan rolon havis ankaŭ s-ro János Nagy, s-ino Edit Lindwurm, s-ro József Eszényi kaj s-ino Anna Bartek. Mi ĝojas, ke la inaŭgura kulturprogramo estis tre bela, riĉhava, kaj ankaŭ la pliaj programoj fluis glate. Fine mi ĝojas, ke se ne ĉiuj, tamen almenaŭ kvin geesperantistoj miaurbaj ĉeestis ankaŭ ĉi landkongreson, kie tage de mia vizito regis bonhumuro kaj kontenteco. Ni dankas la eblecon por partopreni ĉi interesan novaĵon de la nialanda poresperanto movado. **Gratuloj por la organizantoj kaj plian sukcesan poresperanto kunlaboradon al ĉiuj geesperantistoj nialande!**

SinJORINO Adri Pásztor, membro de TEĴA

Fiŝhokistoj inter si

Tri fiŝhokistoj paroladas, fanfaronas. Unu diras:

- Mi prenis tiel grandan fiŝon – kaj li montras la grandecon de la fiŝo.

Lia amiko respondas:

- Ho, tiu nenio estis! Mi kaptis tiel longan fiŝon! – ankaŭ li montras permane la longecon de la de li hokita fiŝo.

La tria fiŝhokisto silentas. Liaj kunuloj instigas lin konfesi, kian grandan fiŝon li hokis. Fine, ankaŭ ĉi homo movas sin kaj faras permane en la aeron grandan cirkon. Vidante tion, la aliaj du ekdemandas:

- Kion vi faras?

Je tio la tria ekparolas:

- Silentu! Ĉi tio estas nur la okulo de la fiŝo!

Sinjoro László Pásztor

Fine de la jaro 2011

Karaj niaj kunlaborantaj samideanoj, amikoj, kaj karaj legantoj! Alvenante al fino de la 2011a jaro, permesu, ke mi gratulu vin pro via bonvolemo, helpemo al ni, kaj pro viaj sukcesoj atingitaj en via vivo. Ni; la redaktantoj, verkantoj, tradukantoj deziras al vi agrablajn jarfinajn tagojn al ĉiuj laŭ sia kredo. Sed, bonvolu akcepti ankaŭ nian suban atentigon por 2012:

Ĉiam havu tempon...

Ridi, ĉar tio estas la plej bela muziko de la Animo

legi, ĉar tio estas la baza ŝtono de la saĝeco

labori, ĉar tio estas la prezo de la sukceso

ludi, ĉar tio estas la sekreto de la eterna juneco

amdoni, ĉar tio kuracas la homon – kaj tiun kiu donas, kaj kiu ricevas

al momenta rideto, ĉar tio estas la plej bela juvelo de la vizaĝo

al kelkaj afablaj vortoj, ĉar pere de tiuj ni povas fari pli facila; la vivon unu por la alia.



Eger



Miskolc- Diósgyőr



Szerencs



Sárospatak



Boldogkőváralja



La 2011an jaron finante, por
la 2012-a jaro bondeziras
nome de la
Miŝkolca „Király Lajos”
Esperanto-Amika Rondo:
Geedzroj Pásztor





NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Tel.: +36 46 738 982

Retpošto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.uw.hu>